





PRIVILEGIO **VOLO**

**al lingvoscio:
Esperanto**

**VILHO
SETÄLÄ**



ESPERANTO

JUNIO 1961

esperanto

JUNIO 1961

54a JARO

REVUO INTERNACIA

N-RO 667 (6)

Fondinto : H. HODLER

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannan-
shire), Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando. Telefono : (010) 128313. Girkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ**
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon
al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro
15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld,
1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la
respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezi-
danto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47,
Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe Mag. Bruno Keppeler, Place Longemalle
16, Genève, Svislando (provizora adreso).

LA FRONTPAĜA BILDO :

"Privilegia vojo al lingvoscio : Esperanto" (Vd.
p. 103).

Enhavo

Nia kulturo kaj nia festivalo	101
Eksterlande	101
Agi kune	102
Lerni kun ĝojo	103
Frederick Delius : disĉiplo de la belo .	105
Vizito al eksperimenta lernejo en Somero	107
Oratora konkurso	110
Parolas kato	111
Krucvortenigmo : solvo	111
Redakcia noto	118

Rubrikoj :

Nia forumo	106
Novaj libroj	108
Internacia karavano al Tokio 1965 . .	110
La internaciaj konkursoj	111
Tra la mondo	112
Ŝaka rubriko	115
La lingva ĥaoso	115
La Juna Vivo	116
46a U.K.	117
Esperantista vivo & Nekrologo . . .	118
Oficiala informilo	119
Radio	119

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Laŭ sia naturo mem, la Esperanto-movado estas kultura movado. Lingvo sen forta kultura fono estus lingvo barbara kaj primitiva. Jam en la komenco, kompreneble, nia lingvo havis kulturan fonon, kio tamen estis la ĝenerale eŭropa kulturo de la malfrua deknaŭa jarcento; iom post iom dum la pasintaj sepdek kvar jaroj kreiĝis kulturo ĉiam pli kaj pli propre esperanta, do supernacia. Kaj tamen samtempe tiu nia kulturo partoprenis ankaŭ en la ĝenerale homa kulturo de la dudeka jarcento.

Literaturo estas nur unu faceto de la kulturo; kaj ankaŭ aliajn facetojn ni kompreneble ne ignoris. Ekzemple, niaj Internaciaj Someraj Universitatoj estas unikaj manifestacioj pri la larĝa bazo de nia kulturo kaj pri la kultura nivelo de nia esperanta popolo. Kulturo estas, finfine, komuna spirita posedaĵo de la grupo — en nia kazo, la komuna posedaĵo de la esperantistoj; kaj multaj esperantistoj kapablas kontribui, kaj ja kontribuas, ion al tiu nia kulturo, kio ne estas propre lingva laŭ sia naturo. Oni parolas pri "germana" muziko aŭ "nederlanda" pentroarto, kio signifas, ke iuj germanoj kaj nederlandanoj faris kontribuon evidente ne dependan de la aparta lingvo, al la komuna kulturo de la homaro. Tiel same, oni povus eventuale paroli pri "esperantista" muziko aŭ "esperantista" pentroarto. Ĉio kreita de la esperantistoj estas iasence parto de la esperanta kulturo, kaj la komuna spirita posedaĵo de nia movado estas jam io por ni grava kaj sentebla.

Pro tio, kiel ni scias, okazos en Harrogate, en la kadro de la 46a Universala Kongreso, la unua Internacia Arta Festivalo, per kiu montriĝos la amplekso kaj atingoj de la esperantista kulturo. Estas tre bedaŭrinde, ke, pro teknikaj kaŭzoj, ne povos okazi la planita branĉo pri plastikaj kaj figuraj artoj, ĉar ĝuste en tiu fako ni estas iom fortaj, kiel oni povas konstati per la rubriko "Verda Paletro" en la revuo "La Suda Stelo — Prometeo". Sed ni vidos ekspozicion de fotografaĵoj, kies temo estos "La homaro": kaj sendube la esperantistoj, pro sia vere internacia karaktero, estas ĝuste la plej taŭgaj personoj por prezenti tiun temon! Same sendependa de la lingvo, sed pruvanta la veran internaciecon de nia movado, estos la montrado de lumbildoj.

Unuavide oni povus supozi, ke la muziko estas iel sendependa de la lingvo; sed la kantado estas escepto al tio; kaj inter la muzikaj eroj de la festivalo estos la kontribuado de niaj jugoslaviaj ensembloj: la kvardekpersona junulara kanthoro Ljubljana (kiu trafis lastatempe 2an lokon en tutnacia konkurso!), la vokala vira okteto Ljubljana, kaj la kabareda ensemblo.

Nia literaturo estos prezentita en la (jam de pli ol dek jaroj okazintaj) Belartaj Konkursoj, kaj ankaŭ en la "Horeto de poezio", kiam oni deklamos el nia poezio. La parola esprimivo de nia lingvo montriĝos en la Oratora Konkurso (pri kiu aperas speciala artikolo sur alia paĝo de tiu ĉi numero de "Esperanto"), kaj ĝia drama efiko sentiĝos per la prezentado de diversaj teatraĵoj, inkluzive de "Advokato Patleno" en prezento de la Internacia Arta Teatro, "La mondo ne havas atendejon" en prezento de la Esperanto-teatro Ljubljana, kaj "La urso" de Ĉeĥov. Jen vere riĉa regalo por niaj kongresantoj!

Dum la tuta semajno okazos prezentado de filmoj parolataj en Esperanto, kaj krom tio estos programo de magnetofonaj sonbendoj, kaj diversaj aliaj aranĝoj, kiuj unuope kaj kune kontribuos al tiu ĉi unua vere ambicia esperanta festivalo.

Tre certe niaj talentuloj streĉos siajn fortojn por fari indan demonstracion pri niaj kulturaj valoroj. Kaj tre certe nia publiko montros grandan intereson pri la riĉa regalaĵo, kaj kuraĝigos siajn artistojn. Ni fieru pri niaj atingoj, belaj atestaĵoj pri la forto kaj valoro de nia idealo!

W. Auld

Laŭ la enketoj de CED, proksimume 12.000 personoj nuntempe partoprenas ĉiujare diversajn internaciajn aŭ landajn kongresojn, konferencojn, seminariojn aŭ similajn aranĝojn, kiuj uzas la Internacian Lingvon. Tre verŝajne kelkaj pliaj miloj da esperantistoj ĉiujare vojaĝas al eksterlando ĉu ofice ĉu turisme. Temas, vere, pri malgranda armeo, kies ĉefa taĉmento atakas la kongresan landon kaj kiu povas ne nur vaste utiligi Esperanton, sed ankaŭ, ĝuste per tiu simpla utiligo, multe helpi al ĝia plua disvastiĝo.

La impona delegita reto de UEA, la relative multnombraj komercaj entreprenoj, publikaj kaj privataj oficejoj, diversaj institucioj kaj organizaĵoj, en kiuj oficas aŭ deĵoras personoj kun scio de la Internacia Lingvo, estas je dispono de la esperantistaro. Tio estas la lokoj, kiujn ĉiu esperantisto devus unuavice serĉi por siaj aĉetoj, mendoj, loĝado, fakaj kontaktoj, informoj k.s., kaj en kiuj, memkompreneble, li devus paroli ekskluzive en Esperanto. Vizito al la loka Esperanto-societo, kaj renkontiĝoj kun esperantistoj ankaŭ ekster la grupo, donas pliajn eblecojn por utiligo de la lingvo, por fortikigo de malnovaj amikecoj kaj kreo de novaj, por pli bona ekkono de la vizitata lando. Fine, ankaŭ ekster tiuj medioj, en la plimulto de ordinaraĵoj oni povas pli bone komprenigi sin alparolante en Esperanto ol balbutante en lingvo fremda kaj al la eksterlandano kaj al la enlandano. Certe, se oni konas la lingvon de la lando, estas nature kaj ĝentile, ke gasto parolu en ĝi al neesperantistoj. Sed se oni ne parolas ĝin, kial ne uzi Esperanton almenaŭ por peti glason da biero, tason da kafo, cigaredojn aŭ similaĵojn? Eĉ se la alparolito ne scias Esperanton, pro la internacieco de la lingvo li tamen komprenos la peton.

Inter esperantistoj — ankaŭ samlandanoj — oni devus ĉiam paroli nur la Internacian Lingvon. Tio des pli gravas en eksterlando. Baldaŭ okazos la Universala Kongreso kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj. Tiuokaze oni ĉiam kaj ĉie kie oni povas, inkluzive dum la veturado, parolu nur en la Internacia Lingvo. Ne altrude kaj sektece, sed nature kaj digne. Krome, neniu esperantisto, ĉu vojaĝanta aŭ ne, malhavu la verdan steleton. Ne multajn, sed unu. Tio, interalie, faciligas la kontaktojn kaj ampleksigas la kampon de la lingva utiligo.

Se ĉiu agos laŭ la supraj sugestoj dum la kelkaj sekvantaj monatoj, tio kreos pli da interesiĝo pri la Internacia Lingvo ol la plej bona informado povas fari dum jaroj.

I. L.

AGI KUNE

Homoj, kiuj parolas la saman lingvon kaj kiuj formas unu popolon, ĝenerale vivas kune en la komuna patrujo. La esperantistoj, kiuj parolas la saman lingvon kaj kiuj formas la esperantistaron — la esperantistan popolon — vivas dise en ĉiu parto de la mondo. Ĉi tiu fakto estas samtempe avantaĝo kaj malavantaĝo. Ĝi estas avantaĝo, kiam la esperantistoj volas pruvi, ke Esperanto estas tutmonda, ĝi estas malavantaĝo, kiam ili volas montri siajn forton kaj unuecon, ĉar ili estas dise en multaj malsamaj landoj. Ĉiujare unufoje nur la universala Kongreso montras la vivkapablecon kaj la unuecon de la Esperanto-Movado. Eĉ ĉi tiu jara kunestado ne donas realan bildon pri la tutmonda Esperanto Movado, ĉar multaj pro diversaj kaŭzoj ne povas partopreni la kongresojn. Ĉu la U.K. en Bruselo post la U.K. en Varsovio signifas, ke la Movado malfortiĝis, ĉar la nombro de la U.K.-partoprenintoj malpliĝis? Tute ne.

Tamen — antaŭ ĉio — la ĉiujaraj esperantaj kongresoj estas la pruvoj de la unueco de la esperantista mondo. Sed kiel montri nian forton, nian unuecon en la tuta jaro?

La bazoj de la Esperanto-Movado estas la unuopaj esperantistoj kaj la kluboj (rondoj, societoj, grupoj ktp.) En la esperantaj gazetoj, revuoj, ofte estas legeblaj anoncoj pri letervesperoj, pri aperintaj senpage ricevataj broŝuroj, turismaj prospektoj, pri nove fondiĝintaj esperantaj organizaĵoj, kiuj atendas helpon kaj esperantaĵojn kaj pri aliaj similaj aferoj. Ekzemple: Multaj radiostacioj disaŭdigas esperantlingvajn programojn. Kompreneble ili volas scii, ĉu ĉi tiuj radiodisaŭdigoj estas aŭskultataj aŭ tute superflue ili laboras per kaj por Esperanto.

Kiel ni povas montri ĉiutage en la tuta mondo kaj en la tuta jaro nian forton, nian unuecon, kiel ni povas organizi multajn nevideblajn Universallajn Kongresojn?

Kiam aperas tiaj anoncoj, kiuj petas la helpon, la apogon de la tutmonda esperantistaro, ni ne atendu, sed ni agu kune! Kiel? Jen:

Ĉiu esperantisto promesu, ke ĉiujare minimume trifoje li skribos je ĉi tia anonco (letervespero, senpage broŝuro, nova societo, radiodisaŭdigo ktp.)

Ĉiu klubo (rondo, grupo ktp.) elektu ageman esperantist(in)-on, kiu legas la gazetojn, revuojn kaj priatentas tiajn anoncojn kaj *tuj agas!* Li (ŝi) skribas la poŝtkarton al la letervespero, gratulas la novan societon, petas la eldonitan prospekton (kio estas plej ofte senpage!) ktp. La elspezo por

la tuta klubo ne estas signifa. Oni povas aĉeti anticipe la bildkartojn sendotajn. Pli efika estas la rezulto, se la tuta klubanaro subskribas la salutleterojn. Kaj se ie oni petas esperantaĵojn, tiu "respondecul(in)o" rigardu, kio troviĝas flankenmetite en la ŝrankoj de la klubo kaj sendu tiujn.

U.E.A. kelkfoje povas direkti la tutan "respondkampanjon", kompreneble nur tiam, kiam temas pri ia grava evento. Tiukaze ĝi indikas en la revuo Esperanto tiujn anoncojn (kiujn poste la naciaj esperantaj gazetoj transprenas), pri kiuj ĝi opinias, ke multaj respondoj estus tre gravaj el la vidpunkto de la tuta Esperanto-Movado. Ekzemple: fondiĝo de nova esperanto societo, asocio en lando, kie ĝis tiam oni nenion sciis pri Esperanto. Tio estos tre grava ĉefe en la estonteco (Afriko, Azio!), do ni devas nin prepari jam nun helpi al la novaj estontaj esperantaj organizaĵoj ĉie ajn en la mondo. Pli grandan kaj pli efikan helpon en la unua okazo al tiuj novaj organizaĵoj ni ne povas doni, sed ni povas montri nian unuecon kaj nian tutmondan organizitecon.

La indiferenteco estas la morto de ĉiu penso, ideo, movado. Indiferentaj "batalantoj" neniigas eĉ ties laboron, kiuj entuziasme laboras. La indiferentuloj estas pli danĝeraj, ol la malamikoj de Esperanto, ĉar tiuj estas en la Movado, dum la aliaj estas ekstere.

Se en Hungarujo fondiĝas nova Esperanto-Muzeo, se en Libano komenciĝas la unua esperanto lingvokurso, se en Hindujo oni petas esperantaĵojn, se en Pollando aranĝas letervesperon entuziasmaj junaj esperantistoj, se en Sud-afriko oni preparas esperantan ekspozicion, se en Brazilo komenciĝas esperanta radiodisaŭdigo, se en Japanujo oni enkondukas Esperanton en iun lernejon, se en Svedujo veterana esperantisto havas la datrevenon de sia naskiĝtago aŭ de sia esperantistiĝo — ni ne silentu, sed ni agu kune, ni helpu unu la alian, ni ĉiuj: la unuopaj esperantistoj kaj antaŭ ĉio la kluboj!

Nur ĉi tiel ni povas montri, pruvi, ke Esperanto vivas, ke ĝi estas disvastigita en la tuta mondo. Eta laboro, sed el la mil kaj mil etaj laboroj naskiĝas la grandaj rezultoj. Se la Esperanto-kluboj kaj la unuopaj esperantistoj ne domaĝas ĉi tiun laboron kaj la malgrandajn elspezojn, la tuta jaro iĝas nevidebla, sed sentebla kaj rezultplena manifestacio pri nia tutmonda unueco.

Estu nia devizo: Esperantistaro de la mondo helpu unu la alian — agu kune!

D-ro I. Nagy

LERNI KUN ĜOJO

Malgranda knabo sidis apud sia lernolibro kaj legis :

— Karpo estas fiŝo, karpo estas fiŝo, karpo estas fiŝo. Ve, kiel tio estas malfacila !

Ne kredu ke li estis malsaĝa knabo. Li estis tre, tre juna. Kaj lia lernolibro sugestis lin al tia sen-senca enkapigo de frazoj, sen kontinua signifo. Ĉiuj liaj lernolibroj estis tiaj : senfinaj vicoj de bestonomoj, riveroj, montoj.... aŭ vortoj de fremda lingvo.

Se li estis sufiĉe persistema, diligenta kaj nelacigebla eĉ per la plej stultaj kvazaŭpoemoj, fine li eble tamen atingis la ŝtupon, ke li povis legi rakonton en fremda lingvo. Li renkontis jen novan vorton, kiun li povis diveni el la kunteksto, jen alian, kies sencon li devis rigardi el vortaro, sed tio jam ne ĝenis. La enhavo de la kontinua teksto kaptis lian menson, la rakonto ravis lin, kaj nun li fine sentis, ke povas esti inteligenta ludo la lernado de fremda lingvo.

Sed ĉu fakte ne povas esti tiel jam de la komenco ? Ĉu iu ne kapablas verki gradigitajn rakontojn, kiujn oni povus rekte eklegi ?

Jen, ni havas fablon el 150 vortoj. Enestas 75 malsamaj vortoj. Jen alia kun 330 tekstvortoj sed nur 30 malsamaj. Se la unua komencus nian lernolibron de nova lingvo, ĝi ja estus multe tro peza, dum la dua estus facile digestebla.

Nun ni trovis kelkajn el la bazaj principoj de kuraĝiga lingvolernilo : Ĝi devas doni al ni intelligentan legaĵon en plej eble kontinua formo, kaj en ĝia teksto la novaj vortoj devas aperi sufiĉe maldense.

Ĉar kelkaj vortoj de la lingvo estas tre oftaj en normala teksto, dum aliaj aperas ŝpareme, nur iam kaj tiam, estas klare, ke la lernilo devas unue liveri kiom eble plej multajn el la oftaj vortoj. Tio ankaŭ faciligas la kompilon de novaj legaĵoj.

Sed kiamaniere la lernanto ekkonu la sencon de la novaj vortoj ? Ĉiama serĉado en vortaro estas teda kaj malrapida. Vortlisto post ĉiu legaĵo faras la libron malalloga. Kaj certe neniu lernas per la unua tralego la sencon de ĉiu vorto — kie do trovi la sencon de forgesita vorto ? Aliparte, lernolibro kun vortaro estas ligita al unu sola lingvo de la lernanto. Precipe por la lingvo internacia tio ne estas dezirinda. Sed ekzistas ja alia solvo. Multaj vortoj estas illustreblaj per bildo. Por aliaj taŭgas internacie interkonsentitaj signoj, kiel &, =, +, 1, kaj ekzemple la ciferoj. Se ni skribas : $1 + 2 = 3$, tion ĉiu povas per sia lingvo legi : unu kaj du estas

tri. Kaj se ni tion lernis en la nova lingvo kaj vidas vorton "koko" sub bildo de koko, ni jam ankaŭ komprenas, kio estas "du kokoj". — Aliparte, kiam ni eksciis, kio estas frato kaj fratino, estas facile klarigi, ke gefratoj estas frato + fratino. Tio signifas, tre baldaŭ ni povas uzi vortklarigojn similajn kiel en Plena Vortaro. Kaj tiam ni jam estas sur la ĝusta vojo al lingvoscio — kaj ankaŭ al uzo de Plena Vortaro.

Por inteligenta lernanto, nenio estas pli ĝojiga ol la solvado de tiaj problemoj. Ni diru ekzemple, ke la vorto 'mia' aperas la unuan fojon. Kaj li legas klarigon : 'Riko diras : "mia piedo" : tio estas : la piedo de Riko', kaj tuj komprenas. Aŭ ni lernis literojn kaj nun aperas 'vorto', eksplikata : 'kelkaj literoj kune estas vorto; ni demandas kaj respondas per vortoj'. Eble kelkfoje la klarigo ne estas tuj komprenata, sed la lernanto pripensas, solvas kvazaŭ krucvortan enigmon. Tio estas intelekta kaj ĝojiga tempopasigilo, kaj kio tiel estas elpensita, tion ni memoros facile.

Se alia lernanto estas malpli inteligenta aŭ, ni diru, maldiligenta, li ja povas uzi la helpon de vortaro — tion ni ne volas malpermesi. Sed li eble forgesos pli multajn el la jam lernitaj vortoj.

Jes, kiel ni faru, se forgesiĝis vorto ? Ĉar la novaj vortoj estas grase presitaj, ni ekscias la aferon per tio, ke nekomprenebla vorto estas malgrasa. Nun ni rigardas al la alfabeto vortlisto en la fino de la libro. Tie estas indiko pri la ĉapitro, kie ĝi unue aperis, kun ekspliko.

Restas ankoraŭ la problemo pri la amplekso de la lernolibro. Ĉe tio nin direktas la rezultoj de statistika studo*). La minimuma kvanto da radikoj, necesa por la ĉiutaga uzo de Esperanto, estas 500—600. Ĉe tio la legado de ordinara literaturo estas ankoraŭ peza, ĉar novaj vortoj aperas meze 15 el 100 tekstvortoj. Ni eble povus nomi la konon de la lingvo pli-malpli perfekta, kiam la kvoto de la nekonataj vortoj falas sub 1%, por kio estas bezona la kono de ĉ. 2000 radikoj. Por privilegia vojo ni elektis la oran mezon, 1300-1400 radikojn, ĉe kio la leganto de romano renkontas 3—4 nekonatajn vortojn el 100 tekstvortoj. Rimarkante ankoraŭ la fakton, ke la radikoj de Esperanto estas des pli internaciaj ju pli maloftaj en uzo, ni povas aserti, ke tiujn 3—4 vortojn la leganto plejparte divenas aŭ

*) "Lingva esprimkapablo kiel funkcio de la vorttrezoro", en Esperantologio I.1 (1949).

rekonas laŭ senco, kaj la bezono de vortaro jam estas minimuma.

Baze de la hipotezo, ke lernolibro, por ne fariĝi peza kaj teda, havu maksimume 8—10% da novaj vortoj en ĉiu ĉapitro, ni do elektis la amplekson de 17—18 mil tekstvortoj, kio plenigis 117 paĝojn.

Per tia maniero ni ekkomprenis la principojn kaj celojn de "natura" metodo en la lernado de lingvo, nome per uzo de libro. Ekzistas ja ankaŭ la "rekta", parola metodo, majstre realigita de Andreo Ĉe. Sed ne ĉiu lernanto povas ricevi majstran instruiston, kaj eble duono de niaj samideanoj ĝis nun kaj ankoraŭ studas per si mem. Por ili ĉi tia natura metodo ja estos ideala. Sed certe ankaŭ multaj instruistoj ŝatos ĝin, precipe ĉe instruo de pli-malpli maturaj, inteligentaj lernantoj.

Kiel tia lernolibro nun estas prezentata "Privilegia vojo al Lingvoscio : Esperanto".

Ankoraŭ ni devas diri kelkajn vortojn pri ĝia enhavo. Estas ja grave, ke lernolibro de la internacia lingvo estu plene neŭtrala je la vidpunkto de kiu ajn filozofio, religio, politiko aŭ nacieco. Ni do esperas, ke neniun ŝoku la fakto, ke en ĉi tiu libro rolas ĉarmaj bestoj — kokoj, porko, urso, kato, vulpo — kiel simboloj de homaj infanoj. Ili reprezentas la karakterojn en simila maniero kiel ĉe Ezopo aŭ La Fontaine — kaj kiel tiaj tute ne estas malŝatinde infanaj aŭ neindaj al la atento de plenkreska homo.

Sed vi diros : nur la praktiko povas montri, kion oni gajnas per metodo, kiu ŝajnas krute rompi la tradiciojn de lingvinstruo. Do, ni donu raporton pri eksperimentoj.

Fakte estas faritaj pluraj provoj per la unuaj paĝoj de la libro. Tio jam havas sian valoron, ĉar "ĉiu komenco estas malfacila". Per ili estas montrite, ke eĉ infanoj, 10—13 jaraĵ, sen malfacilaĵoj komprenas la unuajn paĝojn, kaj al ili ĝenerale ne kaŭzas malfacilaĵon la fakto, ke jam frue aperas vortoj, absolute ne eksplikeblaj per bildo, simbolo aŭ aludo al pli frue lernitaj vortoj (la, sed, de).

Sed ni povis efektivi pli ampleksan eksperimenton per la kunlaboro de plenkreska junulo, kiu faris detalajn notojn pri la tuta studado. Lia gepatra lingvo estas la finna, kio signifas ke el la tuta vorttrezoro de PVojo lia menso povas asociigi apenaŭ 30% da radikoj kun samsenca vorto el la propra lingvo. Li mem juĝis sin malforta en lernado de lingvoj (li iom lernis svedan, germanan kaj anglan lingvojn, sed sen rezultoj).

La unua fazo de la studado konsistis el dufoja tralego sinsekva de ĉiu ĉapitro (krom la ĉapitroj 1, 3, 4, nur unu fojon legitaj). Post tralego de la 11 unuaj ĉapitroj li relegis ilin ĉiujn de la komenco. Same, post studo de la ĉapitroj 12—15 li relegis ilin, kaj poste li studis la finon, 16—53.

Post tio li skribis sian "unuan esperantan leteron", en kiu li donis siajn statistikojn. La tempo uzita por la tuta studado estis 37 horoj 49 minutoj,

dum 29 labortagoj inter la 25/10 kaj 31/12 1958.

La studado okazis el la presprovaĵoj de la libro, en kiu kelkaj bildoj estis neklaraj. Tio kaŭzis la bezonon rigardi al la Ŝlosilo de Esperanto entute 18 foje. Krom tio li precizigis al si la sencon de 109 vortoj, kio estas 8% el la tuta vorttrezoro de la libro. Pro forgeso de jam lernita vorto li rerigardis al la loko de unua apero 121 foje (9%); el ĉi tiuj 33 kazoj estis kunmetaĵoj de antaŭe lernita radikoj kun sufikso aŭ prefikso aŭ alia radikoj. La letero, kiu donis ĉi tiujn informojn kun statistikaj tabeloj kaj vortlistoj, enhavis 122 vortojn da teksto, kaj estis preskaŭ senerara.

Laŭ konsilo de la verkinto la eksperimentanto ankoraŭ foje tralegis la tutan lernolibron. Tiu *dua* fazo postulis 14 labortagojn, sume 14 horojn 4 minutojn. Nun estis nur 7 vortoj kontrolitaj per rerigardo al la unua apero kaj 2 vortoj el la Ŝlosilo. Sekvis letero 210 vorta, kiu montris rimarkindan progreson, kaj en kiu li akcentas, ke "nun ĝi estis tute facila".

Speciale interese estas noti :

1) La lernanto ne kontrolis el vortaro la vortojn, kiuj aperas sen ekspliko (la, sed, se, de, -n, ke, nu ktp.) en la fruaj ĉapitroj (1—11).

2) ankaŭ tiaj eksplikoj, kiuj ŝajnas mankhavaj, ofte ne postulis kontrolon per la ŝlosilo (ekz. 'jam' en la frazo 'jam pli mi ne volas vidi' eksplikita per : 'jam : ne estas necese havi pli').

3) kelkfoje la lernanto konsultis la Ŝlosilon en ŝajne tre klara okazo : ĝuste = senerare.


Ni notu ankoraŭ, ke dum la progresado de lernado, la malfacileco evidente iom kreskis : la tempo uzita po paĝo estis :

en ĉapitroj	1— 5	meze	9 minutoj
„	11—13	14	„
„	25—27	24	„
„	31—33	19	„
„	43—46	14	„

La fina rezulto do estas jena. Matura lernanto, al kiu la vorttrezoro de Esperanto estas preskaŭ tute fremda, povas per lernolibro de la natura metodo atingi plene uzeblan scion de la internacia lingvo per memstudado en la daŭro de ĉ. 50 labortagoj kun po 1 laborhoroj kaj kvarono.

Ĉi tiu konstato estas aparte interesa kompare kun la opinio de la fama lingvisto Mario Pei, kiu diris, ke kiu ajn lingvo estus taŭga por internacia uzo (se oni korektus ĝian ortografion fonetika), ĉar infano sub 6 jaroj lernas same bone la ĉinan kiel la anglan. Nome, profesoro Pei forgesis indiki, kiamaniere oni povus instrui ekz. la ĉinan lingvon al ĉiuj infanoj sub 6 jaroj samtempe en la tuta mondo. Kontraŭe, la lernado de Esperanto ja estas facila ankaŭ al plenkreskintoj, kiuj poste povas instrui ĝin al infanoj kaj al aliaj plenkreskintoj.

Vilho Setälä



LA MUZIKO EN LA KONGRESA LANDO

FREDERICK DELIUS:

DISCIPLO DE LA BELO

de HUMPHREY TONKIN

Frederick Delius, kiu naskiĝis en Bradford je 1862, ĉiam restos iom enigma karaktero en la historio de muziko. Unu el la kelkaj vere elstaraj komponistoj de la nuna epoko, li tamen estas preskaŭ tute ne konata ekster Britujo kaj eĉ en lia propra lando (se Britujo rajtas tiun titolon) lia reputacio restas nesufiĉe alta.

Oni ofte diras, ke muziko, kompare kun pentrarto kaj literaturo, estas tre internacia afero. Eĉ inter komponistoj, Delius estis vere kosmopolito. Liaj gepatroj estis germanoj — lankomercistoj el Vestfaliao — kiuj sin establis en Yorkshire, la centro de la lanfabrika industrio en Britujo, iom antaŭ la naskiĝo de Frederick, la dua filo. Li mem loĝis sinsekve en Usono, Norvegujo kaj Francujo, kaj studis en Germanujo, vizitante ankaŭ plurajn aliajn landojn.

Lia patro, malgraŭ la evidenta muzika talento de la filo, ekde la komenco intencis, ke ĉi tiu ĉarma kaj inteligenta junulo fariĝu lankomercisto. La maljuna Julius Delius do sendis sian filon je komercaj vojaĝoj al Saksujo kaj Skandinavio. Ambaŭ vojaĝoj de komerca vidpunkto fiaskis. Frederick pli ŝatis la kuneston de intelektuloj (kiel Ibsen kaj Heiberg) ol de komercistoj; kaj lin pli allogis la saksa pejzaĝo kaj la norvegaj montoj ol la industriaj urbaroj. Posta vizito al Saint-Etienne egale malsukcesis — pro la tuja vagado de Delius al la ĉarmoj de Monte Carlo. Julius, finfine konstatante, ke lia filo certe ne sukcesos en la lanindustrio, ankoraŭ ne intencis cedi al muzika estonteco por li, ne pro iu persona filistreco, sed verŝajne ĉar li ne kutimis cedi al iu pri io. Frederick estis do sendita al orangbieno en Florido.

Post du jaroj, li gajnis sufiĉan monon en Usono por ekstudi muzikon ĉe Leipzig. Je tiu punkto vere komenciĝis lia muzika kariero, kaj formiĝis liaj postaj limigoj kaj fortoj. Li neniam estis tre lerta ludanto de muziko kvankam brila improvizanto, kaj tiu teknika limigo speguliĝas en liaj komponaĵoj, kiel ankaŭ la elverŝo de senforma beleco kiu montras improvizadan majstrecon. Fakte, la limigoj de formo kaj formala stilo estis al li ĉiam forlogaj, kaj li restis esence romantika, ĝisfunde artisto. Lia muziko estas priskriba, ne abstrakta, kaj laŭ la senco, ke ĝi postulas rekonon de geografia lokigo ĝi estas "provinca". Ĝia "provinceco" kaŭzis siatempe fortan kritikon, sed tiu sama kritiko validas ankaŭ kontraŭ Sibelius kaj Grieg, la frua patrono de Delius.

Sed kvankam la influo de ĉi tiuj nordaj komponistoj troviĝas en la muziko de Delius, ĉi-lastas estas plej rimarkinda ĝuste pro sia sendependeco de eksteraj influoj. Delius ne estis tre erudita homo, kaj (almenaŭ dum siaj pli malfruaj jaroj) eĉ preskaŭ tute ne aŭskultis la muzikon de aliaj komponistoj. Li preferis miksiĝi kun la pentristoj kaj beletristoj de Parizo, forfuĝante de tempo al tempo al la kamparo kaj natura mondo kiujn li amis tiel multe. Ĉe Parizo li renkontis i. a. Gauguin, Edvard Munch kaj Strindberg, kaj la pentristinon Jelka Rosen, al kiu li poste edziĝis.

Post sia edziĝo, li aĉetis domon apud Fontainebleau, kie li restis dum la cetero de sia vivo — preskaŭ 40 jaroj. La strebado por rekono komenciĝis, sed sukceso venis nur malrapide. Delius amis perfektecon, kaj fruajn komponaĵojn li ofte rifuzis publikigi pro ilia manko de matura. Rezulte, nur relative malfrue dum sia vivo li komencis sian plej produktan periodon — kiu donis al li gravan pozicion en nia muzika historio. Al ĉi tiu periodo apartenas la opero "Vilaĝa Romeo kaj Julieta", kiu ne sukcesis sur la scenejo precipe ĉar la muziko

ludis pli gravan rolon ol eĉ la intrigo mem. Ĉi tio estis samtempe la eraro kaj la fortenco de Delius — ke li restis ĉiam kreanto de muziko kiel la profunda esprimilo de homaj emocioj kaj sentoj, kaj vortojn kaj intrigojn li uzis nur kiel intensivigilojn de la esprimpovo de la muziko.

Mencii ĉiujn gravajn verkojn de ĉi tiu periodo ne eblas, sed oni ne povas preteratenti la "Meso de Vivo", la kulminon de lia kariero kaj la komponaĵon kie li malkovris sian filozofion. Delius restis dum sia tuta vivo ateisto, kaj ĉi tiu verko, kun teksto de "Also sprach Zarathustra" de Nietzsche, estas speco de adorado ne al iu dio sed al la vivo mem. La "Meso de Vivo" estas malkvietiga verko, kies triumfo fariĝas malplena kaj kies beleco ŝajnas sencela, sed ĝi entenas la esencon de la homo.

La mondmilito pelis lin al Britujo, sed tuj poste li reiris al sia hejmo ĉe Grez-sur-Loing, kaj tie baldaŭ komenciĝis la teruraj simptomoj de tiu paralizo kiu tenegis lian korpon dum liaj lastaj jaroj. Iom post iom, li ne plu povis uzi siajn korpajn membrojn, kaj baldaŭ ankaŭ liaj okuloj ĉesis

funkcii. Li fariĝis nur ombra ruino de tiu antaŭa homo. Sed lia menso restis egale aktiva kiel antaŭe, ankoraŭ plenplenis de la gloraj melodioj de lia juneco. Kiel doni al la mondo la muzikon kiu ankoraŭ restis en tiu genia kapo? Sen la povo skribi, vidi, eĉ akorde kanti, li estis izolita. Je tiu tempo aperis Eric Fenby, juna muzikisto de Yorkshire, kiu evoluigis kun Delius komplikan diktan metodon por savi tiujn ankoraŭ restantajn trezorojn.

Ĝis la fino, en 1936, Delius do komponis. Hodiaŭ finiĝis epoko. Nun mortis tiuj komponistoj — Peter Warlock, Edward Elgar, Vaughan Williams — kies muziko plej similas al tiu de Delius, kaj en la nuna jaro forpasis Percy Grainger, unu el la plej proksimaj liaj amikoj, kaj Sir Thomas Beecham, kiu pli ol iu alia homo laboris por la popularigo de Delius en Britujo kaj la cetera mondo. Al Beecham ni ŝuldas la porĉiaman pluvivon de lia muziko. Al la erikejoj, la kamparo, la marbordo de lia naskolando Yorkshire ni ŝuldas la unuajn fajrerojn de beleco kiuj ebligis la postan ekbrilon de lia genio.

NIA FORUMO

LA UNESKO-PETICIO

En la kontribuo de D-ro I. Nagy sub la titolo "Ĉu ni vere bezonas literaturon?", publikigita en la aprila numero de "Esperanto", 1961, troviĝas ankaŭ jena frazo: "Oni diras, ke la peticion al UNESKO subskribis ĉ. 16,000.000 da personoj".

Estas pli ol neoportune, ke en la organo de UEA aperis diro en tia nebula formo, kvazaŭ ne temus pri precize establita kaj konata faktoj, pri kiuj siatempe aperis ne nur en "Esperanto", sed ankaŭ en aliaj gazetoj kaj eĉ en la oficialaj dokumentoj de U.N. kaj de UNESKO detalaj informoj. La koncerna peticio estis transdonita la 2-an de aŭgusto, 1950, ne al UNESKO, sed al Unuiĝintaj Nacioj, kiu post kelkaj tagoj sendis ĝin al la Sekretariato de UNESKO en Parizo. La peticion subskribis precize 895.432 individuaj personoj kaj 492 organizaĵoj kun entute 15,454.780 membroj (vidu pri tio la revuon "Esperanto", januaro 1953, pp. 2-12).

Tamen, la nombro de la subskribintoj neniel indikas la nombron de personoj, kiuj efektive parolas la Internacian Lingvon. Enketo, kiun faris CED komence de sia laboro, en kondiĉoj tre malfacilaj, montris, ke en 1951 ekzistis en la tuta mondo iom malpli ol 400.000 personoj, kiuj parolis Esperanton. Ekde tiam, precipe pro la reekfloro de la Esperantismo en pluraj landoj kaj pro la plua normala progreso en aliaj, certe tiu nombro konsiderinde grandiĝis, verŝajne eĉ duobliĝis, sed pri tio mankas precizaj

informoj. En konvena momento CED entreprenos novan enketon tiurilate.

Tiu ĉi korekto neniel ŝanĝas la fundamentan penson de D-ro Nagy, ke la esperantistaro ankoraŭ tre nekontentige apogas sian literaturon, kiu estas sendube la plej grava elemento de la kultura valoro de la Internacia Lingvo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Ĉu ni vere bezonas literaturon?

Permesu al mi atentigi la esperantistaron pri ne ĝenerale konata rezulto de la malgranda vendokvanto de esperantaj libroj.

En multaj landoj, la serioza, krea verkisto estas tiel malbone pagita, rilate al la necesaj laborhoroj, konoj kaj penadoj, ke nur du alternativoj prezentas sin: detrui sian sanon per mizera vivado de muelanta malriĉeco por plene dediĉi sin al verkado; aŭ detrui sian sanon per laborado en du profesioj, unu adekvate pagita, la alia ne. La vasta plimulto da verkistoj devas verki kiam ili estas jam lacaj post taga laboro, kaj grandparte perdi sian tempon nur por gajni la necesajn vivrimedojn. Mi plej estimas tiujn, kiuj kuraĝas vivi mizere por plene dediĉi sin al verkado, sed mi mem, pro manko de fizika kuraĝo kaj forto, elektis la duan alternativon — sed ankaŭ tian vivon ne rekomendas.

Tamen, la nacilingva verkisto ricevas almenaŭ ian pagon, kaj povas esperi pri tia grado de sukceso, ke li povos iam vivteni sin nur per verkado. La elkonkvanto de esperantaj libroj estas tiel malgranda, ke la esperantista verkisto preskaŭ neniam ricevas ian ajn pagon kontraŭ sia in-

telekta laboro. Ne kulpigu la eldonistojn; ili estas same oferaĵoj kiel la verkistoj. Sed la esperantista publiko devus kompreni klare, ke neniu esperantista verkisto nuntempe profitas per siaj verkoj; male; li malprofitas, ĉar ankaŭ por verki esperante oni bezonas paperon, skribmaŝinajn rubandojn, k.t.p.

La leganto verŝajne diros, ke mi estas nur duongrada verkistino kaj ne rajtas atendi rekompencojn. Eble ne; sed per miaj anglaj verkoj mi enspezas almenaŭ iomete, per miaj esperantaj verkoj (kulture pli bonaj) mi nur perdas. Kaj niaj plej altnivelaj verkistoj, ekz. Kalocsay, Baghy, Auld, Ragnarsson, trovas sin en la sama situacio. Mi povas diri, ke se kontraŭ miaj esperantaj verkoj mi ricevus eĉ la samajn pagojn, kiel mi ricevas kontraŭ miaj anglaj verkoj, mi ne plu devus perdi mian tempon en pangajna alia profesio, sed kuraĝus plene dediĉi min al literaturo, kaj, espereble, ne estante konstante laca, verkus iom pli bone.

Mi konfesas, ke la nuna situacio prezentas unu grandan avantaĝon: pure profitebla, kulture senvalora verkado ne okazas en Esperanto. Estas nedece kaj hontinde, ke krea artisto estu monavida; sed ankaŭ krea verkisto devas manĝi kaj aĉeti paperon. Ni verkistoj estas minoritato, kaj nia propra bonfarto kaj trankvilo kompreneble gravas nur al ni mem. Sed, kiom ajn ni estimas la martiran vivon de Zamenhof aŭ Baghy, ĉu estas bone por la literaturo mem, ĉu estas vere kontentige al la esperantistaro, ke la esperantaj verkistoj devas ĉiam elekti inter manĝomanko kaj dormomanko?

Marjorie Boulton

VIZITO AL LA EKSPERIMENTA

LERNEJO EN SOMERO

FINLANDO

La 27—28an de marto subskribinto havis la favoron viziti la mezlernejon de Somero kun la inspektisto, lerneja konsilisto Olli Sampola, kies fako estas la instruado de fremdaj lingvoj. Tie mi rajtis ĉeesti la aŭskultadon de instruado kaj ankaŭ la konferencon, kiun la inspektisto faris kun la instruistoj post la aŭskulto de la lecionoj.

Estas la tria studjaro kun la eksperimenta plano, kiu nun proksimiĝas al sia fino. La observoj faritaj kompreneble ne donas bazon al definitiva prijuĝo de la eksperimento, kies minimuma daŭro estos 5 jaroj. Tamen, la ĝis nun atingitaj rezultoj prezentas grandan intereson.

Pri la cirkonstancoj ni notu, ke Somero estas provinca komunumo ĉefe agrikultura, kun urbeka centra vilaĝo. La loĝantoj estas preskaŭ ekskluzive unulingvaj finnoj. La du studlinioj, unu kun esperanto (C) kaj alia sen nia lingvo (B) koncernas proksimume saman nombron da lernantoj. La lernantoj de esperanto estas plejparte el la agrikulturaj familioj, ĉar la infanoj de oficistaj aŭ komercistaj familioj riskas renkonti malfacilaĵojn, se ili pro sia ofico transloĝiĝus al alia loko. La inteligenteca nivelo de la lernantoj ne estas mezurita, sed la instruistoj diris, ke ili havas la impreson, ke la lernantoj de esperanto estas prefere iom malsuperaj al la aliaj lernantoj. La rezultoj de komparo do almenaŭ ne favoras la lernantojn de esperanto.

Esperanton instruis dum la unua studjaro la rektoro de la lernejo, s-ro Joel Vilkki, dum la dua jaro angla f-no Wheatley kaj en la nuna studjaro hungara s-ro István Mórocz.

La klaso 1 C havas 34 lernantojn (10 knabojn kaj 24 knabinojn), plejparte 11- kaj 12-jarajn. Ili lernis esperanton dum 6 monatoj (de pasinta septembro), 6 lecionojn po 40 minutoj ĉiusemajne. Pro malsano de s-ro Mórocz la subskribinto estis devigita mem doni al ili unu lecionon senprebare. Ĉar mi ne konis ilian vorttrezoron, mi elektis facilan fabelon kiel temon de la instruado, kaj estis surprizita pri la fakto, ke ili konis preskaŭ ĉiun vorton, kiun ni bezonis por la fabelo. La tuta klaso estis neordinare vigla kaj al miaj demandoj ili respondis spontane en koruso. Kaj ne nur tio: kiam mi rakontis, ke la kapro ne obeis sian mastrinon, ili nedemandite ekkriis: *malbona kapro!* Kaj same, pri la ŝnuro, kiu ne volis sufoki la bovon ili meminiciate juĝis: *bona ŝnuro!* Sendube la infanoj jam parolas simplajn frazojn "laŭte, kuraĝe kaj elegante".

La klaso 2C havas 32 lernantojn (14 knabojn kaj 18 knabinojn). Pro la nomita malsano ni perdis la okazon aŭskulti ilin en geografio, kiun ili nun lernas 3 lecionojn semajne per esperanto kiel instrua lingvo, post unujara studo de esperanto, simila kiel la nunjara studado de la klaso 1 C. En lasta septembro ĉi tiu klaso komencis lerni germanan lingvon, kaj ni havis la okazon aŭskulti unu lecionon de ĝi. Pri ĝi ni povis nur konstati, ke la lernantoj progresis bone. La subskribinto opinias, ke oni povis rimarki favoran influon de tio, ke ili antaŭe lernis esperanton, sed tio estas nur subjektiva impresio.

La plej interese estis aŭskulti la laboron de la 3-a klaso. La ero 3 C (34 gelernantoj ĉefe 13-14-jaraj) ja komencis per 6-leciona studo de esperanto en 1958-1959, lernis geografion per esperanto dum 59-60 per 3 semajnaj lecionoj, samtempe komencante la germanan lingvon per 5 lecionoj semajne kaj nun lernas per esperanto geografion (3 h/sem.) kaj desegnon (2 h/sem.), kaj daŭrigas la studadon de germana lingvo per 4 h/sem. La kompara klaso 3 B, kiu tute ne lernis esperanton, komencis la studadon de germana lingvo per 4 h/sem. en 1958-59, kaj daŭrigis dum la du sekvaj jaroj simile kiel 3 C. Ni havis la okazon aŭskulti ambaŭ klasojn, kiuj havas saman instruistinon, kaj konstatis, ke ili atingis jam saman lecionon en sia lernolibro, kvankam la esperantistoj studis germanan lingvon unu jaron malpli (= 4 semajnaj lecionojn malpli). Sed antaŭ ĉio estis granda diferenco en la konduto de ambaŭ klasoj. La gelernantoj kiuj ne studis esperanton faris pasivan impreson. Ili parolis mallaŭte kaj kvazaŭ timante aŭdi sian propran voĉon, dum la esperantistoj sentime kaj laŭte esprimis sin. Ŝajnis ankaŭ — se tio ne dependis de timemo aŭ hontemo — ke la neesperantistoj nur parte kaj malrapide montris sin pretaj respondi al la demandoj de la instruistino, dum la tuta klaso 3 C ĉiam vigle reagis.

La klason 3 C ni povis ekster tio aŭskulti dum la esperanta geografia leciono — la unuan tagon, antaŭ la malsaniĝo de la instruisto. La impresoj estis plene pozitivaj. En la klasejo pendis la mapo de Afriko. Malgranda knabino estis vokita veni al ĝi kaj klarigi, kion ŝi scias pri la insuloj de Afriko. Kaj ni aŭskultis al malgranda prelego 5-minuta, dum kiu ŝi en flua kaj senerara lingvo rakontis al ni ĉion koncernan. Sekvis ankoraŭ du similaj paroladetoj, de knabo kaj knabino, kun lingve simila sukceso, kvankam ili ne montris tute same bonajn konojn pri la faktoj priparolataj. La demandoj de la instruisto kaj la viglaj respondoj kaj senmanka partopreno de la tuta klaso kompletigis la impreson de brile sukcesinta leciono.

En la konferenco kun la geinstruistoj la inspektisto unue konstatis, ke la lingvoscio atingita en esperanto evidente estis tia, kian oni ne povus atingi per iu ajn alia fremda lingvo. Same li konstatis la nekontraŭdireblan superecon de la akirita uzo-kapablo rilate la germanan lingvon, ĉe la esperantistoj. Kaj li turnis sin al la instruistoj kun la demando, ĉu ili opinias, ke esperanto iel influis ĉi tiun rezulton, aŭ ĉu aliaj cirkonstancoj rilate al la lernantoj, povis kaŭzi ĝin. Al tio la instruistinoj de germana lingvo, kiuj ne estas esperantistoj, respondis, ke ili estas konvinkitaj pri la pozitiva influo kiun la lerno de esperanto kiel prepara lingvo havis al la lerno de la germana. Kaj ili akcentis, ke la lernantoj de esperanto almenaŭ ne estas superaj al la aliaj en la nivelo de ĝenerala inteligenteco. Sed evidente la fakto, ke la lernado de esperanto permesis al ili ekuzi novan lingvon en interparolo kun la instruisto jam de la unua leciono, naskis en il kuraĝon kaj memfidon. Ekster tio oni povas kun granda verŝajno pretendi, ke la kapablo akcepti novajn formojn de sinesprimo jam subkonscie helpas al ili la alproprigon de nova fremda lingvo.

La inspektisto, dankinte la instruistojn kaj la nunan kaj la eksrektoron de la lernejo pro la oferita intereso kaj sindona laboro por la grava eksperimento diris, ke la tempo por fari definitivajn konkludojn pri la rezultoj kompreneble ne alvenis ankoraŭ, ĉar la eksperimento daŭras, sed ke la Instrua Administracio sekvos la eksperimenton kun granda intereso, dezirante sukceson al la instruistoj. Grave estas certigi la daŭron de la eksperimento, eble eĉ pli longe ol estis komence planite.

Mi volas aldoni, ke kelkaj el la gelernantoj de Somero jam partoprenis en du Infanaj Kongresoj, kun bonaj spertoj. Parto el ili studis antaŭ la kongresa vojaĝo nur dum unu lerneja jaro nian lingvon; aliaj jam partoprenis la duajaran instruon de geografio per esperanto. Korespondi ili komencis dum la dua semestro de la unua lernejo.

Vilho Setälä

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn ni recenzas; unuope ricevitaĵn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

**William Auld: UNUFINGRAJ ME-
LODIOJ.*** Kun skizo pri la aŭtoro de
John Francis. Ilustraĵoj de David
Hastie Young. Stafeto, Beletraj Kaje-
roj 6. Eld. J. Régulo, Eldonisto, La
Laguna, Kanariaj Insuloj, 1960. 128 p.
19 × 12 cm. Prezo: 3,80 gld.; 15,20
steloj.

Kara Auld!

Hodiaŭ mi fartas pli bone, kaj dum
kelkaj horoj ĝuis la legadon de via
bela libro. Mi volus recenzi ĝin — sed
vere, mi tro facile laciĝas, kaj tia libro
bezonas longan preparolon, apartan
artikolon, ne la ordinaran recenzon.
Ĝi estas unu el tiuj libroj (kune kun
"Ŝtupoj sen nomo"), kiuj povas plaĉi
aŭ ne plaĉi, sed kiuj ne lasos la ak-
vojn trankvilaj.

Tamen mi ne rezignas diri al vi
miajn impresojn — Vi jam scias, ke mi
konsideras vin unu el niaj "kolosoj".
Do mi legis kun avido, scivolo, ple-
zuro. Ke mi ne povis halti ĝis la fino,
tio jam pravas kiom multon mi trovis
en ĝi. Unue, jes, vi, kiel Ragnarsson,
laŭiras la "novan vojon" kaj kelkfoje
ne serĉas komprenon aŭ kunsenton
("Noktaj pensoj", "Variacio"), sed via
poezio restas "komuniko" ĉiam: el ĝi
oni ne tiras nur fizikajn sensaĵojn,
sed ĉiam almenaŭ ion vi diras. Ko-
munaj homoj ne postulas nur "pal-
pad' (on) eterna(n) en tuneloj mensaj".
sed ili aspiras al frateco; kiam oni
alproksimiĝas al poeto, oni esperas,
senkonscie, trovi, ke "ankaŭ li" sentis,
suferis, ĝojis "tion, kion ni sentis",
sed pli intense, kaj ke li, male de ni,
sciis rigardi "tion" kvazaŭ eksteri-
ĝante el sia memo, kaj traduki "tion"
en vortojn, en artesprimon (la samo
valoras por muziko kaj bildartoj). Le-
gado de poezio estas "rekonigo". Pro
tio, larmoj venas el la okuloj, kiam ni
rekonas fraton en la poeto. Oni diras:
"kortuŝo". Ne; estas kvazaŭ ĝojlar-
moj, plenumo de io, kiun oni bezonis,
palpe serĉis; konsolo. Do, vi poetoj
pensu pri la ega respondeco antaŭ la
homaj fratoj. Ĉu vi neniam konjektis,
ke la granda favoro iranta nuntempe
al tiaj stultaĵoj kiaj kanzonetoj (ho, la
frenezo kun kiu, en Italujo, oni sin
ĵetas al Claudio Villa, Mina, k.s. kan-
tistoj..., oni aŭskultas avide la
"kant-festivalojn" de San Remo, Pie-
digrotta k.t.p....), ĉu vi neniam pen-
sis, ke tia favoro devenas nur el la
fakto, ke poezio fariĝis tro malfacila
por komunaj homoj, kaj do ili diras,

"Kantu por mi, esprimu min" al ba-
naluloj kiuj pli-malpli plenumas la
surogatan rolon de "voĉo de l' homa-
ro", kiun vi, poetoj, devis esti kaj ne
plu volas esti....

Revenante al via libro, ĝi tamen an-
koraŭ "parolas", ĝi "plenumas":
"Necesas akso", "Unu el ni", "Venĝo",
(eble la kanto kiu plej plaĉas al mi, en
kiu mi identigas la poet-imagon, kiun
mi bildis en mi pri vi), "Septembra
mateno", eĉ la rikananta "Kanto", kies
versoj kun la.... nu, por mi kruela
refreno min obsedas....; eĉ "Unu el
ni", tragedia, timiga, frostoĵeta, (ho,
kiam vi diras "intenco arda ne sufi-
ĉis", mi sentas skuon riproĉan... an-
kaŭ mi nenion atingis en la "edu-
kiĝa" kampo...). Ankaŭ la lasta
parto, la "Konĉerto", kvankam "vir-
tuoza", ne estas perdita por tiu soifo
kun kiu la komunaj homoj venas al
poezia verko. Tiu maro, ŝtona puto,
trankvila, ĝuebla, super la dronin-
toj.... Tiu saltetado de la "alegro",
kaj la klasika nokto de la "adaĝo"...
Vidu, en tiu "Konĉerto" vi atingas la
preskaŭ-neatingeblan: trovi formon
novan, kaj samtempe ne perdi la kon-
takton kun la leganto.

Intervalo inter liriko kaj muziko:
"Kvazaŭ birdoj konstruas". Ĝi estas
ripoziga afero, kiu malpliigas la ten-
sion de la du partoj. De arta vidpunk-
to, mi tre ŝatis ĝian majstran ekvili-
bron, kaj la redonon de Homera at-
mosfero. Tiu Prokris-Penelopa ren-
kontanta, eble pli homece ol en Odiseo,
sian edzon, ripetanta la faman sce-
non, validan por ĉiu epoko, en tono
minora, sed kun pli freŝaj kaj pli
proksimaj variantoj, tre plaĉis al mi.
Nur, mi ne komprenis kian metrikon
vi sekvis: mi lasis min al la sonoro
de la versoj, sed ne kapablis analizi.
Kaj, kial "kelkmil jarojn antaŭ kris-
to"? Ĉu intence vi pliigis la aĝon de
Ateno, kvazaŭ por diri "ne gravas la
tempo, tio povas okazi iam ajn"?
Pardonu la filistrajn demandojn.

Mi vidas nun, ke mi elplumigis pres-
kaŭ tutan recenzon. En oficiala "peco",
mi estus iom malpli sincera, mi ne
allasus min al certaj konsideroj, al
certaj alvokoj, mi bridus mian entu-
ziasmon kaj ĉefe "dokumentus" ĝin.
Sed venas al mi ideo. Se vi prenis
mian leteron tia, kia ĝi estas, kaj pu-
blikigus ĝin, tio elirus el la ŝablona
tedo de oficiala recenzo, kaj donus al
la libro ĝustan reliefon. Laŭ mi, ĝi

apartenas al la diskut-indaj, ĝi ne es-
tas "unu libro, iu libro ajn".

Mi ĉesas nun. Mi estas tre laca.

Via,
Clelia Conterno

FERMENTARIO*, de Carlos VAZ
FERREIRA, tradukis Prof. Manuel
FERNANDEZ MENENDEZ, reviziita
de Prof. D-ro L. C. PORTO CARREI-
RO NETO, Ak., kaj de Prof. Ismael
GOMES BRAGA, eldonita de URUG-
VAJA ESPERANTO-SOCIETO, MON-
TEVIDEO, 262 paĝoj 21 × 14, prezo
8 gld. (32 steloj).

Por konvene diskuti pri tia verko.
necesus ja fakulo aŭ specialisto. Kaj
mi supozas, ke, se la aŭtoro ankoraŭ
vivus, li verŝajne malakceptus recen-
zon faritan de homo nekompetenta.

Sed, ĉar en la vicoj de la esperan-
tistoj, kaj "a fortiori" inter la espe-
rantistaj recenzistoj, la filozofoj estas
verŝajne ne multenombraj, estas eble
ne seninterese koni la opinion de la
"meza" leganto, de "l'homme de la
rue", kiel diras la francoj, de "l'uomo
qualunque", kiel diras, aŭ ne diras?
la italoj.

En tiu verko la aŭtoro, iama pro-
fesor kaj eĉ rektoro en urugvaja
universitato, prezentas, pri plej di-
versaj temoj: "ekde la teorio de Ein-
stein ĝis la agado de la grandaj ho-
moj, pasante tra demokratio, protek-
tismo, arto, religio, jura filozofio, ktp.,
ktp.", tutan serion da relative mal-
longaj studetoj, eseetoj, aŭ pensoj,
kiujn li opinias bone tiel mallonge
publikigi, ne finitajn, ĉar li ne havus
sufiĉan tempon por detale, ĝisfunde,
analizi ĉiun el ili je dimensioj de ku-
tima verko, kaj ĉar li opinias, ke es-
tus bedaŭrinde tiujn ideojn almenaŭ
ne elmeti antaŭ la publikon: "Kaj ne
morti kun tiom da aferoj en la animo."

Kaj fakte siajn ideojn kaj observojn
li tie prezentas kaj supraĵe esploras
en notoj duon- ĝis maksimume ses-
paĝaj.

Mi mensogus, se mi ne dirus, ke
tiu prezento kelkfoje pensigis min pri
Montaigne aŭ La Rochefoucauld, sed
mi same mensogus, se mi dirus, ke
ĝi bone toleras komparon kun tiuj du
majstroj. Fakte, mi devas diri, ke mi
ne sukcesis "asimili" la plej multajn
el tiuj filozofiumaĵoj, kies "fermen-
tario" devus, laŭ klariga noto de la
tradukinto, "kvazaŭ fermentoj agiti
nian menson ĉe la formiĝo de ideoj
antaŭ kristaliĝo".

Jes, se kelkaj el tiuj pensoj ŝajnis
al mi banalaj evidentaj (mi volonte
riskus tie la neologismojn "truismoj"),
se aliaj ŝajnis al mi el tia speco, en
kiu oni tre facile povas inversigi la
terminojn kaj tiel ricevi same bone
akcepteblan solvon — aliflanke, la
esprimado de ne malmulta nombro
de tiuj pensoj efikis al mi tre fumece
kaj neklare. Mi ja diris, ke mi estas
unu meza leganto! Cetere la aŭtoro
anticipe konsolis min asertante (p.
198), ke "ofte la geniaj spiritoj kom-

prenas nur tion, kion ili mem pensas (kaj ne ĉion)".

Pli sukcese interesas la aŭtoro ĉe la pli mallonga parto de la verko, nome en "Psikogramoj", mallongaj pensoj-asertoj, "Reagoj", notoj pri verkistoj kaj artistoj rilate tiun aŭ alian verkon ilian, kaj "Pseŭdo-humoro" el kiu unu ekzemplo: "Oni ne mortigas la ideojn.... Vere! Sed ankaŭ ne la malbonajn", ŝajnus pruvi, ke la aŭtoro pli ĝuste trafas, kiam li nur mal-longe esprimas sin. Alia ekzemplo, el la Psikogramoj, kun kiu mi konsentas, kvankam ne kun la kelkfoje esprimita opinio de la aŭtoro koncerne la religion: "Kiel malfacila estas ofero antaŭ ol farita; kaj elfarite, kiel facila!"

Ke la verko ofte ŝajnis al mi ne klara, tion ni ŝuldas absolute ne al la traduko. Male, la traduko estas farita en vere bonega lingvo, kaj Juan Régulo Pérez devos aldoni unu nomon al la listo de la kapablaj hispanlingvanoj, pri kiuj li plendis, en "La Suda Stelo", ke ili estas tro malmultenombraj. Ja oni ne scias, kiun parton el la gratuloj atribui al la hispanlingva urugvajano tradukinto, aŭ al la du portugallingvaj brazilanoj reviziintoj, sed la rezulto estas vere sukcesa kaj menciinda.

Preseraroj estas tre malmultaj; la prezento, preso kaj papero tre bonaj. La verkon utile sekvas glosareto, kompilita de la tradukinto, en kiu mi tamen notos kelkajn misaĵojn koncerne la francan lingvon, i.a. tiun monstran "je m'en plâne", pri kiu mi defias kiun ajn francan doni akcepteblan klarigon!

"En la vosto la veneno...." Se kelkaj opinioj, ke mi pruvis mian senrajtecon al recenzado de tia verko, ili renkontiĝos kun la aŭtoro, kiu (p. 198) krias: "Sed ke ekzistas tiaj kritikistoj, kiuj ne komprenas pli ol unu solan specon de arto, tio estas plej absurda; tiuj ne indas pardonon nek rajtas esti tiaj."

Amen!

Roger Bernard

ESPERANTO, Ariadna fadeno de l'koro kaj de l'spirito, dulingva teksto (esperanta kaj franca), de Pierre DELAIRE, eld. Centre National Espéranto-Office, prezo 10 guldenoj, ĉe la aŭtoro, 9 bis, rue du Commandant-de-Poli, ORLÉANS (Loiret). 196 p. 21 × 14.*

Tiu ĉi libro estas la dulingva reprodukto de bona propaganda prelego pri Esperanto farita antaŭ provincurba publiko. Tiu prelego celis montri al, aŭ pli ĝuste: gvidi (Adriadna) la publikon en la malkovro de tio, kio estas Esperanto, kial ĝia naskiĝo, kio ĝia celo, ĝiaj atingoj, eblecoj, ktp.

La argumentoj estas validaj, kvankam ili ofte direktiĝas pli multe al la koro, al la sentemo, ol al la racio de la homoj. Kaj en tiu senco, mi bedaŭras, ke ili estas laŭ mia opinio kelkloke pufigitaj, iom bombastaj: ja la

junkora aŭtoro volas esti entuziasmon: muŝojn oni ne per vinagro logas!

La publikigo en franca lingvo povas esti bona propagandilo kaj ankaŭ modelo por samcelaj prezentvesperoj. Mi ne bone vidas, kian utilon alportas la esperanta vesto de tiu prelego, kiun povas legi nur Esperantistoj, principe jam konvinkitaj: ekzercon por perfektigantaj esperantistoj?, sed tiu libro ja ne estas, kaj ne celas esti, instrulibro. Aliflanke, la aŭtoro asertas, ke la apudmeto de ambaŭ formoj de la teksto povas helpi al nefrancoj, kiuj volas kontroli aŭ perfektigi sian konon de la franca lingvo: jes, se, kiel li esperas, "tiu ĉi verko ĉirkaŭos la mondon", kion mi kore deziras al li.

Al mi ŝajnas plej trafa la 2-a, Aldona, parto: "Demandoj kaj Respondoj", kiu kunigas informojn ĝenerale nur dise troveblajn en diversaj partoj de la esperanta dokumentaro.

La verkon utile kompletigas resumo de la gramatiko kaj unua leciono pri la lingvo (por instigo al lernado!) kaj listo de adresoj de plej diversaj esperanto-organizaĵoj, -gazetoj, ktp. Plie, ĝin igas plaĉa kelkaj interesaj fotoj, el kiuj unu faros certe tre grandan plezuron al D-ro Privat, kiu en 1959 aspektas eksterordinare juna! Sed Prof. Waringhien certe grumblos pro la sia!

Roger Bernard

DICTIONNAIRE PRATIQUE d'ESPERANTO, Français-Esperanto kaj Esperanto-Français, eld. SAT-Amikaro, Parizo, 1959. Prezo: 9,60 gld.; 38,40 steloj. 530 p. 15 × 10, kartona kovrilo.*

Tiu ĉi vortaro celas, antaŭ la iam aperonta "Grand Dictionnaire Français-Espéranto", super kiu verŝajne jam kovadas G. Waringhien, kaj la nun laŭdire baldaŭ venonta "Dictionnaire Français-Esperanto" de Léger kaj Albault, doni sub praktika formato vortaron jam sufiĉan por lernantoj kaj perfektigantoj, antaŭ ol ĉi tiuj kapablos rekte utiligi la Plenan Vortaron.

Efektive, en la tempo de ĝia apero, fine de 1959, ne plu estis trovebla franca vortaro por la parto franca-esperanto (mi ne parolas pri la poŝvortareto de L. Bastien, utila memorhelpilo), kaj ĝia manko estis tre grave sentebla por kursgvidantoj.

La parto Français-Esperanto de tiu vortaro estas do bonvena: se ne kompleta, ĝi almenaŭ provizas konsiderindan kvanton da esperantaj ekvivalentoj al la francaj vortoj aŭ esprimoj, sub prezento klara kaj ĝusta. La 2-a parto, Esperanto-Français, entenas, laŭ aserto de la eldonisto (mi ne kontrolis!), ĉiujn radikojn de la Plena Vortaro kaj de ĝia Suplemento. La tuto estas do bona kaj utila laborilo, kiu povas sufiĉi al la simplaj uzantoj de la lingvo, kvankam ĉi tiu verko tute ne malatentas multajn teknikajn, geografiajn kaj personajn nomojn.

Roger Bernard

PLUK miniaturaj poemoj de Poul Thorsen. Ellonis Dana Laborista Esperanto-Asocio, Arhus 1960. Formato 11 × 15 cm. 96 pagoj, kovril-desegnaĵo de Erling Hofft. Prezo 2,50 gld.; 10 steloj.*

PLUK eble fariĝos la nova stilo -- mallonga verseto, kelkfoje dulinia, en kiu eĉ la helpa verbo povas manki; PLUK eble fariĝos la nova parolmaniero -- slogan-stila esprimado de ideoj;

PLUK eble fariĝos la ŝatata poemformo por homoj ne havantaj tempon legi longajn versojn kaj malemaj al filozofia meditado;

PLUK eble ŝokos kelkajn, sed tiuj sekvu la averton de la aŭtoro kaj ne legu la "parajn" pagojn.

PLUK-poemetoj ne estas sentimentaj, nek profunde homaj, nek korŝiraj nek tragikaj.

La dana poeto Poul Thorsen en siaj miniaturaj pluk-versoj tamen tuŝis multege da problemoj en -- kaj ekstermovadaj. Sur 100 malgrandaj pagoj de la malgranda, poŝformata flaveta libro, la plukpoeto pikis per trikvarliniaj versetoj kaj la koloniismon (AFRIKO) kaj ekzistencialismon, kaj atomismon kaj hobismon

Precipe la edzojn aplaŭdu

kun propra edzino kiel hobio

-se ne ŝin okupis alia por tio.

kaj maneken-stulton

—, se iu pli stulte

povas anseri sub flirta negliĝo.

kaj la HIGH SOCIETY

mi konus kelke da "harpoj"

el superklaso de nia socio

pretaj fariĝi edzin' de simio.

kaj amon, kaj statistikon, kaj televidon, kaj multajn flankojn de la movado en tute mallongaj poemetoj kiaj MEMENTO MORI, DUBINDEJO, MAJUSKLE, IMPONECO, LA INTERNA IDEO aŭ en iom pli longaj, kia SIMPLA KOMUNIKO-STRANGA EFIKO.

La eternaj kritikuloj en niaj societoj povus parkerumi. sen granda memorstreĉo, ke estas

Pli bone erari

ol tute nenion fari.

Kaj niaj kongres-ekskursantoj ricevis la versan formon de sia ofte demonstrata principo.

Longe iru

sed lunĉon unue akiru!

PLUK konsilas, PLUK kondamnas, PLUK primokas, PLUK kritikis, PLUK konstatas --sen argumentado. sen klarigado, kelkfoje en la esprimmaniero iom ŝoka, kelkfoje per la lingvoformoj iom kuriozaj, sed ĉiam en la stilo neofendiga, petola, alloga kaj minimume temporaba.

Sekvu, do, la konsilon de PLUK:

Se librojn vi ne havas

spirite via vivo flavas.

Do, libroj por la mono

antaŭ bier' kaj pantalono!

P.S. Tielnoma poemo ekzistas, sed enhavolisto-ne. PLUK ekstreme ŝparas la tempon de siaj legantoj. Imitinda ekzemplo!

Emilija Lapenna



La "Pokalo Ivo Lapenna", kiun ricevas la gajninto en la ĉiujara Oratora Konkurso.

En la riĉa programo de la lastjaraj Universalaj Kongresoj, la Oratoraj Konkursoj por junuloj estis la alloga programero. La kongresanoj ĉiam bone vizitis tiun kongres-aranĝon, aŭskultinte kun intereso la belajn vortojn de la junaj oratoroj. Bedaŭrinde, nia junularo en tiu aktiveco ne partoprenis sufiĉe. En kelkaj Oratoraj Konkursoj partoprenis nur tri konkursintoj, pasintan jaron en Bruselo la nombro atingis kvin gejunulojn. Sed, konsiderante la gravecon de la parollerto, ankaŭ la nombro kvin ne kontentigas. Bonajn parolantojn, scipovantajn konvinki la aŭskultantojn pri la prezentataj argumentoj, elokventajn propagandistojn, kapablajn ĉiam, kun aŭ sen preparo, diri logike kaj flue kelkajn vortojn en Esperanto, ni ege bezonas. Ankaŭ fortaj politikaj partioj aprezas la oratorojn, ĉar ne multaj homoj posedas tiun talenton kaj la publiko de la tuta mondo admiras tiun kvaliton. Nebezzone speciale emfazi kiom gravaj estas oratoroj en la movado, antaŭ kiu staras ankoraŭ multaj bezonoj konvinki iun, forigi ies antaŭjuĝon, persvadi iun kaj varbi multajn por siaj ideoj.

Junuloj estas tiuj, kiuj devus kompreni tiujn bezonojn.

Junuloj estas tiuj, kiuj devus aprezi la klopodojn de UEA direktitajn al eduko de estontaj oratoroj.

La temoj de la ĉiujara Oratora Konkurso, okazonta dum la Universala Kongreso en Harrogate, estas diversaj, interesaj, kaj kio speciale gravas, ili ebligas al la junaj oratoroj elekti la preferaĵon en la abundo de proponitaĵo.

- 1) **Huliganismo kaj junularkrimo;**
- 2) **Ĉu la hodiaŭaj universitataj studprogramoj kontentigas la nuntempan junularon?**
- 3) **Problemoj kaj aspiroj de la hodiaŭa laborista junularo;**
- 4) **La dezirata rolo de la esperantista junularo en la ĝenerala Esperanto-Movado;**
- 5) **En kiu senco arto estas internacia lingvo.**

Partopreni rajtas ĉiuj junuloj ĝis 28-jaraj, kiuj aliĝis al la Universala Kongreso en Harrogate. La partopreno en la Konkurso estas senpaga, sed ĉiu kandidato devas sin anonci al la prezidanto de la Konkurso prof. Gaston Waringhien, minimume unu tagon antaŭ la tago de la Konkurso.

Oratora Konkurso

La Konkurso estos publika sub prezido de la prezidanto de la Komisiono kaj en ĉeesto de du membroj de la juĝkomisiono.

La kandidatoj devos paroli pri la temoj en Esperanto, libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povos uzi memorigajn notojn. Ĉiu kandidato rajtos paroli proksimume 10 minutojn, sed la Komisiono povas, depende de la nombro de kandidatoj, longigi aŭ mallongigi tiun limtempon.

La Komisiono decidos pri la unua, dua kaj tria gajnintoj tuj post la Konkurso.

La gajnintoj ricevos diplomon kaj premiojn, laŭ la decido de la Estraro. La nomo de la unua gajninto estos engravurita sur la arĝentan "Pokalon Ivo Lapenna". Ĝian brilan surfacon unu nomo jam ornamas, tiu de la itala junulo Carlo Minnaja. Kiu sekvos?

Junuloj, la Movado de vi multon atendas, ne restu surdaj, kapabliĝu ĉiufanke por foje transpreni la torĉon el la manoj de la nunaj gvidantoj. Kaj unu el la plej ŝatataj ecoj de gvidanto estas ĝuste la parolarto.

Preparu vin por multnombra ĉeesto en la Oratora Konkurso, Harrogate.

Atendas vin la tuta kongresanaro kaj la juĝkomisiono:

Prof. Gaston Waringhien, Francujo
Emilija Lapenna, Jugoslavio
Günther Becker, Germanujo


INTERNACIA KARAVANO AL TOKIO 1965

Kun plezuro ni informas, ke post nia antaŭa alvoko ni ricevis principan sinanoncon por la aviadila vojaĝo jam 30 personoj. Se tio estas la rezulto post unu monato, ni povas fidi je la rezulto post kvar jaroj. Kompreneble, la anoncintoj faris la rezervon "se mi vivos kaj estos sufiĉe sana" ktp., sed ĉiukaze ili havas la firman intencon partopreni. Ni kore esperas ke tio ĉi estos instigo por multaj aliaj sekvi tiun ekzemplon kaj principe anonci sin. Ju pli frue ni scios pri la supozebla nombro da partoprenantoj, des pli konkrete ni povos plani la detalojn kaj des pli energie ni povos agi por ekstrema reduktado de la kostoj. Oni relegu la informojn sur la paĝoj 45, 75 kaj 94 de resp. la marta, aprila kaj maja numeroj de "Esperanto" 1961. Kun plezuro ni atendas viajn reagojn!

*M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.*

Parolas Kato

(Lia Miaŭa Moŝto, "Montevideo", kies homo estas
Marjorie Boulton)



Nun mi ripozas post legado
pri granda fiŝa kavalkado.
En ĉiu kata rond' progresas
la libro estos interesa.
Poemo aŭ romano ŝimas;
neniu kato ĝin estimas,
sed nun mi signas (per salivo)
ke temas pri reala vivo,
io utila, io grava,
io al ĉiu kato rava.
Al miaj multaj verdaj fratoj,
tutmondaj esperantaj katoj,
la libron do mi rekomendas,
kaj "ĉiu libro-servo vendas".
Al viaj homoj miaŭe petu
ke ili ĝin por vi aĉetu;
vi fiŝkaptemon montros voste,
kaj certe vi ronronos, poste.
Sed diru al la homoj ankaŭ
ke ne pri servo aŭ pri dank' aŭ
komplezo al la katoj nur
temas, pri nia kat-plezur'.
La libro pri la fiŝa tem'
ja plaĉos al la homoj mem.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1961

Stato je la 30-a de aprilo

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando	2515	2395	95,23
2.	Britujo	6688	6081	90,92
3.	Svedujo	6325	5275	83,40
4.	Belgujo	2121	1764	83,17
5.	Svislando	2120	1750	82,55
6.	Nederlando	5716	4697	82,17
7.	Usono	3660	2775	75,27
8.	Hispanujo	2585	1930	74,66
9.	Francujo	7516	5498	73,15
10.	Danlando	3002	2033	67,72
11.	Japanujo	2860	1875	65,56
12.	Brazilo	5100	3148	61,73
13.	Italujo	4247	2570	60,51
14.	Germanujo	7490	4510	60,21
15.	Norvegujo	1993	1170	58,71

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Novzelando	965	954	98,86
2.	Kanado	665	625	93,98
3.	Aŭstrujo	1580	1405	88,92
4.	Portugalujo	535	445	83,18
5.	Israelo	250	200	80,—
6.	Madagaskaro	250	168	67,20
7.	Aŭstralio	1146	705	61,52
8.	Islando	250	125	50,—
9.	Sudafriko	375	150	40,—
10.	Argentino	960	375	39,06
11.	Urugvajo	250	95	38,—



25 mil danoj okaze de la paskotago marŝis kaj mitingis por vekti intereson pri la problemo: la danĝeroj rilate al atombomboj. Partoprenis inter 30 kaj 40 esperantistoj individue. Tri esperantlingvaj afiŝoj okulfrape kontribuis. Partoprenis la 72-jara muzikpedagoga samideanino Petra Nielson, eble la plej malnova esperantisto ankoraŭ vivanta, kiu eklernis Esperanton jam en 1906. Si ekmarŝis de Holbaek je paskvendredo, kaj staris portante la afiŝon sur la ŝtuparo antaŭ la urbodomo. Bedaŭrinde la bildo ne estis kaptita tiam, sed oni vidas ŝin maldekstre de la afiŝo, portanta ĉapelon kaj intense aŭskultanta al la parolantoj, inter kiuj estis la nuna socialdemokrata ministro s-ino Bodil Kock.

Krucvortenigmo

Solvo de la enigmo en nia maja numero

1	S	2	E	3	N	4	D	5	P	6	E	7	N	8	D	9	A	
9	U	N	U	A				10	I	N			11	A	Ã			
12	B	U	D					13	P				14	E	N	T		
15	J	A						16	S	U	R	F	A	C	O			
	E							19	V	I	L	A	O		20	O	R	
21	K	22	A					23	L	I	S	T	O				I	
24	T	R	I	K	O	T	O							26	P	T		
27	I	N	O											28	A	R	A	
29	V	I						30	D	O				32	P	L	E	T
33	A	K	C	E	P	T	O	N	T	O								

Tra la Mondo

Aŭstrujo

● **Stata Esperanto-Ekzamenkomisiono** restarigita. Sub direkcio de la supera studkonsilanto prof. d-ro E. J. Görlich okazas ree ŝtataj ekzamenoj pri instrukapablo kaj lingvoscio; pluaj komitatanoj estas s-anoj lenejdir. d-ro F. Scheibenreiter, senatkonsil. d-ro L. Grimme kaj ofickonsil. E. Wener.

● **Aŭstria Esperanto-Konferenco 1961** okazis en la tagoj de la 26a ĝis 28a de majo en Klosterneuburg kaj en Vieno. Samtempe okazis la 17a jarkunveno de la Aŭstria Esperantista Federacio.

● **En Innsbruck-Tirolio** gvidas s-ano financ-kontrolanto H. Steiner ree Esp.-kurson en la landa porinstruista instituto.

Britujo

● **En kunsido en Dover, Britujo, U.E.A.-delegitoj** el Belgujo kaj Britujo decidis pliintimigi rilatojn inter esperantistoj en plej proksimaj lim-regionoj de Belgujo, Britujo kaj Francujo, per ĉiujara printempa kongreseto okazonta laŭvice en la ĉefaj havenurboj. Partoprenos ĉiuj povantaj atingi koncernan havenon, kaj en ĝia kadro okazos ankaŭ regula kunsido de U.E.A.-delegitoj. Unu celo estas re-veki en tiuj ĉi gravaj centroj popolan interesiĝon tian, kia ekzistis en 1905, jaro de unua U.K. en Boulogne-sur-Mer.

Eĉ izoluloj loĝantaj en aŭ ekster Ostende, Dunkerque, Calais, Boulogne estas petataj iniciati inviton por 1962. Provizora sekretario estas U.E.A.-delegito en Dover.

● **La adresaro de la Veterana Esperantista Klubo** eldonita en 1956 estas nun preskaŭ elĉerpita, kaj oni intencas publikigi noveldonon tuj post la nunjara U.K. Oni volas kapti tiun okazon por plibonigi ĝin, kaj estus tre danko al VEK-anoj kaj sekretarioj de landaj organizaĵoj se ili bonvolus esplori la nunan liston kaj informi pri dezirataj korektoj, adresŝanĝoj kaj okazintaj mortoj de anoj. Ĉiu individua informo helpos. Skribu al: Maurice Lewin, 33 Kingscroft Avenue, DUNSTABLE, Beds., Britujo.


Ĉeĥoslovakio

● Ekde 16a ĝis 26a de aŭgusto 1961 okazos en la mondfama kontraŭreumatisma banloko Trenčianske Teplice (ĈSSR-Slovakio) **Somera porpaca Esperanto-kolegio** kun internacia partopreno.

En ĝia kadro estos aranĝitaj E-kursoj por infanoj, komencantoj, progresintoj, E-instruistoj kaj tradukistoj. La nombro de partoprenantoj ne estas limigita.

La programo de SPEK estas tiel dividita:

Antaŭtagmeze instruado kaj prelegoj de en- kaj eksterlandaj fakuloj, posttagmeze laŭ gusto ekskursoj, bano, tenisludado, volejbalo, ebleco de kuracado je reduktitaj prezoj, vespere amuzado en la spacaj ejoj de moderna



Kursanoj de Esperanto en la ŝtata mezgrada lernejo "G. Reni" en Bologna (Italujo). Maldekstre staras la lernejestrino, prof. Maria Capponcelli Martini, Kavaliro Zacconi (instruisto), kaj prof. Egle Dalla Vale, (instruistino).

sidejo de SPEK (Domo de la Kanthoro de slovakaj instruistoj).

Manĝado 5-oble potage. Redukto ĉe fervojveturado en ĈSSR.

Detalajn informojn kun prospekto petu senprokraste ĉe:

Metstský dom osvety (Urba kleriga domo) Bratislava, Suché Mýto 17, ĈSSR-Slovakio.

La tuta restado kostos 350,— Kčs.

Venu en ĈSSR pasigi parton de Via libertempo en agrabla medio!

Finnlando

● **La gazeto "Keski-Pohjalainen"** daŭrigas sian serion da artikoloj tradukitaj el Esperanto. En la numero de la 27a de marto aperis "Bretona ceramiko", kiu aperis en la revuo "Esperanto" de marto 1951. La tradukon faris f-ino Olga Ihander.

Francujo

● **Sukcesaj Kongresoj en Norda Francujo.** La Franc-Norda Esperanto-Federacio sukcese kunvenis en Lille, okaze de la internacia komerca foiro. S-ro Lesoin salutis la oficialulojn, la 60 francajn delegitojn kaj unu polan observanton. Sekvis informoj pri UEA, ĝemeliĝo Valenciennes-Düren, projektitaj internaciaj renkontiĝoj, ktp. S-ro Bouquin talente prelegis pri "Homaranismo kaj Lingvoj". Krome la ĉeestintoj plezure aŭskultis diskojn el dek landoj kaj komentis lum-bildojn preparitajn de s-ro Lentaigne. Post komuna manĝado, kantoj kaj deklamo de poemo dediĉita de s-ro Auguez al la esperantista "tago", restis tempo por viziti la Foiron kaj fari ekzamenojn.

Dank' al la sindonemo de loka rondo, ĝenerala federacia kunveno okazis la 4an de junio en Amiens (Somme).

● **Infanrestado por Esperanto-parolantoj.** Okazos en Vallon-Pont-d'Arc de la 9a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 1961. Ĉiuj informoj kontraŭ adresita koverta plus internacia respond-kupono al: G.E.E., 6 Rue de la Paix, BAUGE (M & L), Francujo.

● **Sub titolo "En Sovetio ankaŭ ekzistas kino-amatoroj...."** kaj ili skribas al ni en Esperanto", mi sukcesis

aperigi dulingvan (francan kaj esperantan) alvokon de sovetaĵ kinoamatoroj en grava franca revuo "CINE-AMATEUR", kiu estas ankaŭ oficiala organo de la Internacia Unio de Amatora-Kino. Tio estas bona rezultato, tamen ekzistas eblo fari pluajn pozitivajn paŝojn antaŭen!

Se eksterlandaj amator-kino-kluboj (prefere ol unuopuloj) montras intereson pri interrilato kun la supre menciita Revuo, ili povas rekte al la Revuo sendi informojn (aŭ raportetojn) pri la amatora-kino-faradoj en siaj landoj. Se la materialo estus valora, ĝi estus presata en la Revuo (post traduko) kaj la aŭtoroj ricevus rekompencan (senpagan abonon, pri-kino-librojn).

Kompreneble, la anonco ĉefe validas por la popoldemokrataj landoj, el kie oni ne kutime ricevas informojn pri tiu speciala temo. La legantaro certe komprenos la gravecon de tiu-ĉi alvoko, ĉar temas pri tre serioza demonstracio de la eblo de Esperanto kiel ilo de internaciaj rilatoj. Oni sendos ĉiujn informojn al la ĉefredaktoro: S-ro Pierre BOYER, 29 rue Vernet, PARIS (8) FRANCUJO.

Grekujo

● **Internaciaj Ferio-Semajnoj** okazos en Tesaloniko de la 14a ĝis la 28a de aŭgusto. Plena kaj interesa programo estas aranĝata. Aliĝkotizo: unu usona dolaro. Korespondadreso: Vivo kaj sano, Poŝtkesto 131, Tesaloniko, Grekujo.

Germanujo

● **Zamenhof-strato.** Nun ankaŭ la urbo Kolonjo apud Rejno havas sian jam delonge deziritan Zamenhofstraton. La ĉefurbestro de Kolonjo, s-ro Th. Burauen, forte ŝubtenis la tiurilatajn klopodojn de la loka unuiĝo.

● **Esperantlingvaj fakvortaroj kiujn I.S.A.E. eldonas kiel rekomendojn.** La Terminologia Centro — TC — ekigis eldoni esperantlingvajn fakvortarojn alligiĝantajn al la grandaj plurlingvaj difinvortaroj eldonitaj de internaciaj fak-organizaĵoj kaj rekomenditaj de UNESKO. Ankaŭ ĝi preparas el-

doni memstarajn fakvortarojn esperantajn pri specialaj fakoj, pri kiuj ankoraŭ ne ekzistas internacia terminaro, ekz-e TERMINARON PRI MIKROSKOPIO (de Prof. E. Balech, Argentino) kaj VORTARON DE STATISTIKA GRAFIKO. (de Prof. D-ro M. Ziomek, Pollando).

Dum Aprilo 1961 T. C. jam publikigis kiel PROJEKTON de ISAE-REKOMENDO sian unuan aneksan terminaron, nome esperantlingvan indekson de la FUNDAMENTAJ NOCIOJ de la fako ELEKTROTEKNIKO, do vortliston alligigantan al la sep-lingva INTERNATIONAL ELECTRO-TECHNICAL VOCABULARY, 2nd EDITION, Group 05, FUNDAMENTAL DEFINITIONS published by INTERNATIONAL ELECTROTECHNICAL COMMISSION (I.E.C.), 1954.

Ĝi konsistas el du partoj: 1-a parto: INDICO - ESPERANTA, 2-a parto: ESPERANTA - INDICO (alfabeta indekso esperanta).

T.C. sendis ekzemplerojn de tiu PROJEKTO de ISAE-REKOMENDO al ĉiuj fakuloj, kiuj estas petataj, sendi interne de 6 monatoj kritikon, do voĉdoni pri la sankcio de la PROJEKTO. Kromaj ekzempleroj de la "projekto" estas haveblaj kontraŭ du internaciaj respondkuponoj ĉe

Terminologia Centro

dipl. ing. R. Haferkorn,
Königsseer Str. 50,

(13b) Berchtesgaden, Germanujo
Hispanujo

● **Instituto de Esperanto en Barcelono.** Interesega vizito estis tiu de D-ro. Hamvai el Auckland, Nov-Zelando, juristo hungardevena, fakdelegito pri folkloro, kaj landa reprezentanto de aliaj esperantaj organizaĵoj, kiu en akompano de sia edzino, estona esperantistino, faras prelegvojaĝon tra Eŭropo sub aŭspicioj de U.E.A. D-ro. Hamvai prelegis unue en la Sindikata Fakoj "Educación y Des-

canso" C.N.S., kaj poste en "Instituto Balmes". (mezgrada lernejo).

La temoj de la paroladoj estis pri Nov-Zelando kaj pri diversaj flankoj de la vivo de blankuloj kaj maorioj. La menciitaj prelegoj okazis kun prezento de koloraj lumbildoj, kio konsistigis veran frandaĵon por ĉiuj.

Ĉar la familia lingvo de Gesinjoroj Hamvai estas jam de dudek jaroj Esperanto, oni jam povas facile imagi kiom brile trafa, kaj sukcesa estis lia klara stilo, kiu dekomence altiris ĉies atenton. Krom tio, la prelegisto spicis la paroladojn pere de spritaj maoriaj proverboj kiuj estigis ĝeneralan rideksplodon. D-ro Hamvai ankaŭ gvidis en la "Academia Sil", Esperantokurson laŭ la Cseh-Metodo, kiu bone sukcesis.

Nia klera vizitinto ankaŭ prelegis en la urboj katalunaj, Sabadell, Manresa, kaj aragona urbo Zaragoza. Senbezone diri ke la vizito kaj prelegoj de D-ro Hamvai okazis sub la aŭspicio de Instituto de Esperanto kiu planis iom anticipe la koncernan programon.

Hungarujo

● **Hungarlanda Filatelio Asocio (MABEOSZ)** aranĝos en la nuna jaro de la 23a de septembro ĝis la 3a de oktobro grandan internacian renkontiĝon de tutmondaj filatelistoj kaj samtempe ekspozicion. La ĉefsekretario, D-ro László Steiner, montris sin tre favora al Esperanto kaj al nia movado. En la oficiala organo "Filateliai Szemle" (Filatelio Revuo) inter la aliaj lingvoj li uzis ankaŭ Esperanton por inviti la diverslandajn filatelistojn partopreni la ekspozicion. En la ĝenerala programo de la ekspozicio okazos ankaŭ esperantista filatelista renkontiĝo organizita de la Hungara Esperanta Asocio. Estas en preparo presaĵoj kun apliko de 5 lingvoj: franca, angla, germana, rusa kaj Esperanto. La esperantlingva eldono aperos en 10.000 ekz.



La 86-jara fraŭlino Margrethe Noll, honora membro de U.E.A., membro de la veterana organizaĵo (esperantisto de 1907) kaj Kopenhaga Esperantista Klubo prelegis en Kopenhago dum 10 lecionoj pri "La historio de mond-lingvoj". Tiu studrondo estas la unua, kiun oni akceptis okazanta en fremda lingvo sub la vesperlerneja leĝo.

Italujo

● **"Esperanto-aleo" en Romo.** En la plej moderna kvartalo de Romo, kie troviĝas la Palaco de la Kongresoj kaj la tute novaj Sporta Palaco kaj Ciklokurejo, ek de la 7-a de februaro nunjara kvin marmoraj stratabuloj kun



la skribaĵo "Viale dell'Esperanto" ambaŭflanke, laŭ bela serpentumanta aleo longa preskaŭ 700 metrojn, indikas, ke ĉi tiu strato estas dediĉita al la Internacia Lingvo. Per tiu decido, farita jam en aprilo 1959-a, la Estraro de la ĉefurbo de Italujo volis honori L. L. Zamenhof okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo. Jen la stratabulo troviĝanta ĉe la komenco de la aleo apud la granda artefarita lago de kvartalo EUR.

Jugoslavio

● **La jarkunveno de Slovenia Esperanto-Ligo** okazis en Ljubljana la 25an kaj 26an de marto. Ĝeneralan raporton pri la agado de la Ligo donis la Prezidanto Peter Zlatnar, kiu substrekis la sukcesojn kiujn atingis la Ligo, precipe en la lernejoj, eldona kaj kultura aktiveco, sur turisma kampo kaj en la rilatoj kun aliaj organizaĵoj. Ni resumas nur la ĉefajn sukcesojn atingitajn dum la pasinta jaro:

La junulara esperantista kanthoro okupis pasintjare la 2-an lokon en konkurado de 150 kanthoroj. Kooperado kun ŝtataj eldonejoj "Mladinska knjiga" kaj "Državna založba" malkovras perspektivojn por novaj eldonoj. Oni notas 100% plialtiĝon de anaro inter la junularo. Esperanto estas instruata en 24 lernejoj en 13 lokoj de Slovenio. Junulara tendaro en Lesce fariĝis renkontiĝejo de tutjugoslavia junularo. En la esperantista junulara laborbrigado partoprenis 19 slovenaj gejunuloj.

Inter la konkludoj por estonta laboro oni akceptis interalie la organizon de preparseminario por geinstruistoj dum la ferioj, fondiĝon de studrondo pri la temo: Esperanto kaj la socio, eldonon de jam preparita materialo pri la historio de E-movado partoprenon de esperantistoj en la programo (lerneja, komunuma, distrikta, respublika) de Jugoslaviaj pioniraj ludoj, ktp.

● **Anglaj infanoj-esperantistoj en Jugoslavio.** La 31-an de marto alveturis al Ljubljana grupo de 19 anglaj infanoj kaj 3 geinstruistoj el Birmingham por 10-taga restado en Jugosla-

vio, dum kiu ili faris ekskursojn al Postojna, Opatija kaj rondvojaĝon tra regiono Gorenjsko. La infanoj estis gastoj de la lernejo "Prežihov Voranc", en kiu Esperanto estas instruita. En julio ĉijara la sama nombro de slovenaj infanoj reciprokos la viziton al Birmingham, kie ili estos gastigitaj. La lokaj aŭtoritatoj en Ljubljana finance subtenis parton de la kostoj por la restado de anglaj infanoj en Slovenio.

● **Vizito de urbestrino kaj urba kanceliero de Dover (Britujo) al ĝemelurbo Split (Jugoslavio).** La 2an de majo alvenis en Split la oficiala grupo el brita urbo Dover, gvidata de tiea urbestrino kaj urba kanceliero. La ideon pri tiu ĉi vizito kaj ĝemeliĝo de la du gravaj havenurboj donis fine de la pasinta jaro la UEA-delegitoj de la menciitaj du ĝemelurboj, s-ro Norman H. Smith, sekretario de Dovera E-Klubo, kaj s-ro Aleksa Hršić nome de la E-klubo en Split.

Notinde estas, ke la urbestrino s-ino Aldermanino Bushell antaŭ publika kunveno de la loka Komerca Ĉambro, en ĉeesto de kolegoj reprezentantaj francajn urbojn, sin esprimis favore al enkonduko de Esperanto en lernejoj de Dover. Aliflanke estas konate, ke la ŝipfarejo "Split" lanĉis la unuan ŝipon kun la nomo de D-ro L. L. Zamenhof.

La gastoj restis en Split dum kelkaj tagoj kiel gastoj de s-ro Senjanović, prezidanto de la distrikta konsilantaro Split. La esperantistoj en Split kaj ĉirkaŭaĵo efike utiligis ĉi tiun okazon favore al la E-movado en ambaŭ ĝemelurboj, montrante al la instancoj kaj al la reprezentantoj, ke nia lingvo ekzistas kaj utilas jam inter la popolamaso.

Nederlando

● **La "Zamenhof" en Rotterdam.** Meze de aprilo la konata pola ŝipo "Zamenhof" vizitis kelkajn tagojn la havenon de Rotterdam. Kelkaj deputitoj de la roterdamaj esperantistoj bonvenigis ĝin, estis tre afable akceptitaj de la kapitano S-ro Wozny kaj prezentis al li kelkajn donacojn. La kapitano, kiu mem ne parolas Esperanton, rakontis ke je lia agrabla surprizo en ĝis nun preskaŭ ĉiuj havenoj esperantistoj bonvenigis la ŝipon kaj ke per tio li havis jam tre interesajn renkontiĝojn. Li donacis belan foton de la ŝipo al la vizitantoj.


Pollando

● **Pola Radio eldonis belan prospekton** pri la Esperantaj Elsendoj, kun la ondolongoj por la printempa-somera duonjaro. Oni petu ĝin de: Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Varsovio, Pollando.


Laŭ la tradicio de la antaŭaj jaroj, ankaŭ en la nuna jaro la Pola Radio organizis por siaj aŭskultantoj eksterlandaj Sportan Konkurson okaze de la Internacia Biciklista Pac-Konkurso Varsovio-Berlino-Prago, kiu okazis ekde la 2a ĝis la 16a de majo. La kon-

kursaj demandoj estis jenaj: (1) Kiu nacia teamo venkos en la kolektiva klasigo? Divenu la naciecon de individua venkinto en la konkuro. Bedaŭrinde ni ne ricevis informojn pri tiu konkurso sufiĉe frue por atentigi niajn legantojn, sed espereble multaj aŭskultantoj de la Pola Radio ensendis siajn respondojn en nia lingvo — kaj eble troviĝis inter la gajnintoj.

● **Esperanta semajno okazis en Olsztyn (Norda Pollando)** de la 25a de marto ĝis la 1-a de aprilo 1961. Paroladis redaktoro Jerzy Uśpieński el la esperanta redakcio de "Pola Radio"



pri "Internacia Lingvo Esperanto sur la ondoj de etero". Ekspozicion de libroj kaj gazetoj oni starigis en la legejo de Vojevodio kaj Urba Biblioteko; la ekspozicion aranĝis artistoj geplastikistoj Maria Szymańska kaj



Henryk Oszczakiewicz. La librejo "Dom Książki" elmontris en unu sia fenestro aĉetebajn esperantajn librojn, kaj la loka gazeto "Głos Olsztyński" publikigis vastajn informojn pri la Semajno.

Svislando

● **Esperanto kaj Geonismo.** La organizantoj de la feriaj kultur-semajnoj en Münchenwiler anoncas Someran Forumon pri la temo: "TEKNIKO, HUMANISMO, POEZIO". Prelegos kaj direktos la diskuton: Marcel Jacard, Dr. sc. ĥemiisto; Charles Ecabert, Profesoro de lingvo latina; Bruno Graf, Prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Skizos sintezon: William Perrenoud, Dr. sc., biologiisto, direktoro de la F. K. S. La rajto partopreni estas donita al ĉiu ĉeestanto.

Ne sufiĉas lerni, studi, esplori, — diras la ĵus aperinta prospekto sespaĝa, ornamita de du belaj fotoj, — oni devas ankaŭ trovi vojojn, solvojn, procedojn. Por tio necesas, ke post ĉiu prelego okazu viglaj debatoj, ĝis

la aŭdintoj, plene konvinkitaj, estas pretaj al fruktodona agado. Tiel okazos en niaj kultursemajnoj. Tuta aro da francaj, germanaj, italaj, nederlandaj aŭ svisaj samideanoj anoncis jam sian aktivan kontribuon. Venos ankoraŭ multaj aliaj, per kio montriĝos, ke "Granda estas la povo de multaj kun unu volo".

Dum la lastaj jaroj la geonismo grandege disvolviĝis kaj fortiĝis. Ĝi atestas sin venke en ĉiuj siaj sektoroj: esploro, apliko, transdono. Multaj homoj jam ne dubas plu, ke nur per ĝi Esperanto kapablos atingi sian kulminon.

Unuflanke, plej altaj kaj trafaj konceptoj estras la tutan aktivecon de la F.K.S. Aliflanke, la vivo en la impona, digna, sed samtempe ege gast-invita kastelo estas tute simpla, kaj riĉa je kora varmo. La geonismo ne postulas unuformecon. Ĝi deklaras: "Restu fidela al via raso, gento, deveno, lingvo, religio, sed atentu pri la homeco kaj agu ĉiam laŭ ĝiaj indikoj".

Krom la lingva studo kaj la beletro la programo anoncas: arto, kursgvidado, sporto, filmoj, muziko, ekskursoj, ... kaj ni precipe ne forgesu! ankaŭ feria ripozo.

La prospekto estas sendata senpage eĉ en pluraj ekzempleroj, al ĉiu, kiu ĝin petos de: Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse 12, Bern (Svislando).

... neniu pledis por Esperanto!

Meze de Aprilo 1961 okazis en Hamburgo (Germanujo) la dua kunveno de la konstanta konferenco de la eŭropaj instruminstroj. Tiu ĉi "Konstanta Konferenco" estus la plej taŭga instanco por doni al Esperanto sian decan lokon en la kultura vivo eŭropa.

Ĉeftemo de la "Dua Kunveno" estis la instruado de almenaŭ unu fremdlingvo ankaŭ al la infanoj de ĉiuj elementaj lernejoj en Eŭropo.

Posta gazetraporto diris:

"Oni supozas, ke prefere la angla kaj franca lingvoj estos instruataj. Por la aplikado de komuna artlingvo neniu el la instruminstroj pledis."

La Germana Esperanto-Asocio provizis la konferencanojn per bonega argumentmaterialo en germana lingvo*).

Tamen, tute certe mankis al la reprezentantoj la komisionoj de la koncernaj parlamentoj kaj registaroj, pledi por Esperanto.

Se estonte la landaj Esperanto-Asocioj kaj UEA sukcesos profunde prepari siajn parlamentojn, registarojn kaj instruminstrojn, en venontaj kunvenoj la "Konstanta Konferenco" vidos la vojon irendan kaj la instruminstroj pledos unuvoĉe por Esperanto.

August Weide


*) Krome, UEA, pere de la estrarano por la Eŭropa Lingvokampanjo kaj pere de la landaj asocioj, havigis al la ministroj ampleksan Memorandon en nacia lingvo.

Dir. C.O.

Ŝaka Rubriko


(Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Problemo n-ro 12 (konkursa problemo 3)
K. Traxler (Ia pr. Právo Lidu 1911)



Mato en 2 movoj (pro ĝusta solvo 2 poentoj)
Kontrolo : Bl. Rd3, Dc5, Td7, Ke8, Ĉf5 p. g2, g3 (7)
Ni. Rg4, Th5, p. f6, h6 (4)

Problemo n-ro 13 (konkursa problemo 4)
A. Anderssen



Mato en 3 movoj (pro ĝusta solvo 3 poentoj)
Kontrolo : Bl. Ra1, Tg1, Kf8, Ĉe5, Ĉf6 (5)
Ni. Rh8, Th7, Ke8, Ĉg7 (4)

Solvojn sendu al gvidanto de la rubriko ĝis 31.10.61.
Ni atentigas, ke oni povas ankoraŭ sendi la solvojn de problemo n-ro 10 (konkursa problemo 1), kiu estis en februara numero. Ĝis duono de aprilo venis solvoj el 12 landoj. La fina cifero estos certe multe pli granda, ĉar ni havas jam adresojn de esp. ŝakistoj el 40 landoj.

La Lingva Haoso

Lingvoj en Cejlono

Ankoraŭ restas la ebleco, ke la konflikto inter parolantoj de la sinhala kaj de la tamila eksplodos denove al sangverŝado — tiom pli, ĉar jam la Tamila Federacia Partio anoncis, ke ĝi ne plivastigos sian nunan agitado ĝis revenos hejmen la ĉefministro, s-ino Bandaranajke. Sed estas tre danĝera situacio.

La lingvoŝtormo pretiĝadis minimume ekde 1956, kiam ambaŭ ĉefaj partioj faris elektkampanjo surbaze de promeso, ke ili faros la sinhalan la sola oficiala lingvo. La mortinta s-ro Bandaranajke, kiu venkis, enkondukis la Akton pri Oficiala Lingvo por plenumi tiun promeson, sed post du jaroj da malpaco kaj perdado de multaj vivoj en la interbatiĝoj de 1958 li ankaŭ ratifigis la Akton pri Tamila Lingvo (Specialaj Arangoj; tio devis permesi la "moderan uzadon de la tamila" en edukado kaj administrado en la plejparte tamilparolantaj landpartoj.

La 1-an de januaro nunjara, la Akto de 1956 efektiviĝis, kaj post kelkaj tagoj oni ratifis komplementan Akton pri Lingvo de la Kortumoj. La antaŭa registaro estis eksigita, kaj la nuna registaro de la Libereca Partio elektita, per helpo de la tamiloj; efektive, la nuna opozicia partio akuzis dum la elektoj, ke la Libereca Partio havas sekretan interkonsenton kun la ĉefa tamila partio. Tamen la Ministro pri Justeco anoncis je la 1-a de januaro: "Antaŭ kelkaj tagoj... la registaro formulis planon, laŭ kiu

oficistoj de la ŝtato, ĉu pli fruaj aŭ pli lastaj alvenintoj, estos devigitaj akiri" scipovon pri la sinhala "en la daŭro de difinita nombro da jaroj".

Tion ĉi rigardas la Federacia Partio kiel perfidon de la promeso de s-ro Bandaranajke, kiel ĝi estas enkorpiĝita en la Akto de 1958; ĝi antaŭvidas, ke la tamiloj havos daŭrajn malavantaĝojn en ĉiuj oficialaj postenoj. La 20an de februaro la partio komencis piki registarajn oficejojn en la norda kaj orienta provincoj, kie tamilparolantoj estas pli multnombraj: ĝi sukcesis haltigi administradon, tiel ke s-ino Bandaranajke, antaŭ ol veni al Anglujo, diris ke ekzistas "neniu regado en la nordo kaj la oriento". Demonstracioj estas vunditaj de policanoj, kaj akreco pliiĝis, kiam soldatojn oni flugveturigis al tiuj regionoj.

Sinhale-parolantoj kaj tamilparolantoj en Cejlono ambaŭ bezonas la plej grandan sinregadon dum la venontaj kelkaj semajnoj, se ili volas denove kunvivi tiel pace kiel ili iam tion faris.

Laŭ "Guardian", Manĉestro,
22.III.1961

Lingva kverelo ĉe la proceso "Jeanson"

La taggazeto "Le Monde" raportas pri lingva kverelo dum la proceso al la "Reto Jeanson", kulpigita pri helpo al la alĝeria Liberiga Fronto. Por la muzulmanaj akuzitoj estis nomita interpretisto parolanta la dialektan araban lingvon, sed unu el la kulpigitoj deklaris, ke li parolas nur la literaturan araban kaj ke pro tio li ne povas interkompreniĝi kun la interpretisto. La tuta sesio estis vane dediĉita al la solvo de la lingva problemo.

Kaptita de... la angla lingvo

Asher Khan, pakistana civitano, alvenis al la pariza flughaveno Orly por ŝanĝi aeroplanon, ĉar li volis iri al Londono: Li pretendis paroli la anglan lingvon, sed neniu el la deĵorpersonaro de la flughaveno sukcesis kompreni eĉ unu el liaj vortoj. Tiel Asher Khan foriris kaj revenis du tagojn poste akompanata de du policanoj, kiuj trovis lin vaganta tra la stratoj de Parizo kun la bileto al Londono en la poŝo. Malgraŭ la klopodoj de dekdu flugprizorgistinoj, neniu sukcesis kompreni unu solan vorton el liaj eksplikoj: tial oni metis lin en aviadilon direktotan al Londono. Sed, post malmultaj horoj Asher Khan revenis al Parizo: la angloj estis lin resendintaj.

Kompreneble li ne sukcesis ekspliki la kialon. Tiel Asher Khan, eble nur kulpa paroli tro difektante la anglan lingvon, fine estis kondukita al malliberejo ĉe Choisy-le-Roi, el kiu li foriris, ĉar la francaj instancoj decidis lin aersendi al Karaĉi. En la momento de la ekveturo Asher Khan diris ion, eble salutvortojn, sed neniu sukcesis lin kompreni!

Lingvaj eraroj ĉe la oftalmologoj

Okaze de la XIX Internacia Kongreso de Oftalmologio en New Delhi, kiu okazos en 1962, la organiza komitato presigis kovertojn kun la dulingva indiko por "presaĵoj": "Printed Matter" kaj "La matière empreinte". La dua esprimo devus signifi "Impri-més" en la franca, sed ĝi estas laŭvorta traduko de la angla teksto kaj en la franca ĝi signifas nenion.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Altmannsdorferstr. 90;
Wien XII, Aŭstrujo.

FELDBERG

IJK - TEJO-estrarkunsido

Paske okazis laŭinforme sur Feldberg en la Nigra Arbaro (Germanujo) internacia junulara kunveno kaj en ties kadro TEJO-estrarkunsido. La aranĝo estis plena sukceso, kiel skribis nia prezidanto Günther Becker. Bedaŭrinde la detalan raporton mi ne plu povis utiligi por tiu-ĉi numero de IJV.

WOKINGHAM

17-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

Adreso : Downing College, CAMBRIDGE, Britujo

17a I.J.K. de T.E.J.O.



WOKINGHAM
12-19 aŭgusto 1961


La IJK okazos de la 12-a ĝis 19-a de Aŭgusto en la bela urbo Wokingham, proksime al Londono. La kotizo inkluzivas ĉiujn manĝojn, dormadon kaj ĉiujn kongresajn ekskursojn kaj aranĝojn. El la programo : Diservoj, diskutoj kaj prelegoj (William Auld, d-ro Ivo Lapenna, Gian Carlo Fighiera) amuza vespero, balo, subĉiela vespero, sportaj kaj oratora konkursoj, ekskursoj al Oxford, Abingdon-on-Thames (surŝipe), Windsor kaj Londono!

Prezo : por TEJO-membroj malpli al 20-jaraj : 6,18,0, por TEJO-membroj pli ol 20-jaraj : 7, 5, 0. Nemembroj de TEJO pagas je 10 angl. ŝil. pli. Samtempe kun la aliĝo oni devas sendi antaŭpagon de 3,10,0 anglaj pundoj, al la supra adreso.

Glumarkoj de la 17-a IJK kostas po folio (12 pecoj) 6 pencojn aŭ unu internacian respondkuponon plus 3 pencojn por afranko. Bildpoŝtkarto de Wokingham same kostas po peco 6 pencojn plus afranko (3 pencoj).

Geamikoj en tutmondo ! Aliĝu baldaŭ la nia kongreso, kiu estas nia plej bela, plej ampleksa kaj plej grava aranĝo. Multaj geamikoj diverslandaj jam sendis sian aliĝon, ankaŭ Vi ne pre ne manku !

r = radiko
m = mallongigo



Horizontale

1. vikle; 6. diligenti; 12. peni ne esti trafita de io; 13. pagilon; 14. denove; 15. Artiklo (Esp.) ; 17. lia amatino; 18. digna (r); 19. metalo (r); 20. numero; 21. demando pronomo (r); 22. konjunkcio; 24. sufikso esprimanta daŭron; 25. varma trinkaĵo (r); 27. ŝia amato; 28. birdujo (r); 29. Ligo Esperantista Internacia (m); 30. United States (m); 31. konjunkcio post komperativo; 33. nedifinita afero; 34. Popola Demokratio (m); 36. malgranda (r); 37. ligvorto; 38. partipo pasiva por pasintaĵoj; 40. malkuraĝo (r); 42. nombro; 43. Kongresa Sekretario (m); 45. parte; 46. utopio, fantazio (r); 48. arboj kun elasta ligno; 50. ame tuŝeti; 51. malgranda arbo.

AL LA TUTMONDA JUNULARO

Vi verŝajne jam legis pri la Junulara Forumo en Moskvo ĉi-somere, kiu okazos de 25.VII xis 3.VIII. La Forumo diskutos problemojn, kiuj sendube interesas junularon en la tuta mondo : pri Paco, kondiĉoj de laboro kaj studado por junularo en diversaj landoj, pri internaciaj kontaktoj. Estas ege dezirinde ke kiel eble pli da esperantista junularo partoprenu tiun internacian Forumon, por atingi, ke Esperanto estu en ĝi plenrajta interkomprenilo. Moskva esperantista junulara grupo Fajrero petas ĉiujn esperantistojn partoprenontajn en la Forumo anonci sin ĉe la adreso : USSR, Moskvo, K-9, poŝtkesto 1253. Junulara Esperantista grupo Fajrero. Bonvolu indiki vian fakon.

Vertikale

1 gaso; 2. arbo kun fortika ligno (r); 3. en tiu loko; 4. kiel 38 horiz; 5. per haroj kovrita (r); 7. ŝati, havi inklinon; 8. prefikso; 9. nedifinita persona pronomo; 10. spirbrui dumdorme; 11. esti digna, meriti; 16. perorela percepto (r); 17. verŝi; 23. prefikso, iama, estinta; 24. vivtempo; 26. angla biero; 27. rando de la buŝo (r); 30. oportuna, uzebla; 32. Loka Kongresa Komitato (m); 33. porjunulara TEJO-aranĝo,

ĉijare en Wokingham (m); 35. esprimota (r); 36. scienco pri moralo (r); 39. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (m); 41. masonaĵo; 42. Organo Internacia Scienca (m); 44. prepozicio; 45. sufiksa adverbo, volonte; 47. zebro (m); 49. lingva batalo (m).

Solvojn sendu ĝis plej malfrue 15-a de julio al la redaktoro de IJV. Libro-premioj estas gajneblaj.

Gejunuloj : Vi estas invitataj kunmeti ankaŭ enigmojn kaj sendi ilin al la redakcio de LJV por publikigo. Sendu ankaŭ aliajn kontribuojn kaj informojn al la redaktoro de LJV.

Ne ĉiu esperantisto

estas ano de Universala Esperanto-Asocio. Sed UEA, kiel la ĉefa internacia organizaĵo de neŭtralaj esperantistoj, estas la centro de la internacia movado por enkonduko de la Internacia Lingvo tie, kies ĝi estas urĝe bezonata, kaj kie ĝi povas plenumi sian unikan rolon. Forta UEA = forta internacia movado.

Se vi konas esperantiston, kiu ankoraŭ ne aliĝis al UEA, kial ne sendi lian nomon kaj adreson al nia C.O. ? Ni tre volonte sendos al li specimenan ekzempleron de nia revuo, por ke li ekkonu iom pli intime la laboron de nia Asocio. Por helpi al la kreskado de nia membraro kaj al la plua progreso de Esperanto : agu hodiaŭ !



46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate 5 VIII - 12 VIII 1961 Britujo.

Korespondadreso : 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate.
Telefono : Harrogate 4685.
Telegrafo : Esperanto Harrogate.
Banko : Midland Bank Ltd., Harrogate.

Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento" (Londono 2-4 Aŭgusto 1961) : S-ro Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, Londono N. 5.

17-a T.E.J.O.-Kongreso (Wokingham 12-19 Aŭgusto 1961) : S-ro T. G. Page, 90, Ross Street, Cambridge.

Internacia Geografia Semajno (Leicester 12-19 Aŭgusto 1961) : D-ro R. H. Osborne, c/o Dept. of Geography, The University, Nottingham.

6-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO FARIĜU "ADOPTAJ GEPATROJ"

En la pasinta jaro pli ol 70 individuaj esperantistoj aŭ esperantistaj organizaĵoj respondis al la alvoko de la Kongresa Komitato de Bruselo fariĝi "Adoptaj Gepatroj". En la daŭro de kelkaj monatoj la kapitalo tiel kolektita sufiĉis por inviti 10 infanojn el landoj malproksimaj aŭ kun devizaj malfacilaĵoj (4 estis el Finnlando, 3 el Pollando kaj 3 el Jugoslavio). La operacio "Adoptaj Gepatroj" multe kontribuis al la sukceso de la Kongreseto, kiu por la unua fojo kolektis la rekordan nombron de 87 infanoj.

Ankaŭ en la nuna jaro la Kongresa Komitato troviĝis antaŭ la problemoj, ke multaj etuloj — modele parolantaj Esperanton — sopiras partopreni en la ĉiujara festo de la esperantista infanaro, sed ne povas plenumi sian deziro pro manko de mono aŭ, eĉ havante la monon, pro manko de devizoj por la forveturo. La Kongresa Komitato de Harrogate opinias, ke la meritoj pli valoras ol la financoj kaj ke la kolektiva volo kaj entuziasmo de la Esperanto-Movado povas ankoraŭfoje solvi la malfacilaĵojn.

Kiel organizanto de la 6-a Internacia Kongreseto, L.K.K.-Harrogate sin turnas al la unuopaj esperantistoj tra la mondo, al la Landaj, Fakaj kaj Lokaj esperantistaj societoj kaj al ĉiu, por kiu la feliĉo de tiuj infanoj kaj la estonto de la Internacia Lingvo estas kara, kun varma alvoko malavare fariĝi "Adoptaj Gepatroj". La kotizo estas fiksita je 3 anglaj pundoj, pageblaj ĉe la konto de la 46-a Universala Kongreso de Esperanto (Midland Bank Ltd., Harrogate) aŭ ĉe la Kongresaj

Perantoj. La "adopto" ne rilatas al aparta infano, sed al komuna kaso. La sumoj kolektitaj per la kotizoj de la "Adoptaj Gepatroj" estos uzataj ekskluzive por pagi la vetur — kaj restadkoston al infanoj (kaj eventuale al unu aŭ du akompanantoj) el landoj malproksimaj aŭ kun devizaj malfacilaĵoj aŭ el nebonstataj familioj. Ĉiuj "Adoptaj Gepatroj" ricevos memordiplomon, kiu estos transdonita publike dum la infana prezentado, kaj ilia nomo estos enskribita en la albumo de la Infana Kongreseto, kiu estas transdonata de Kongreseto al Kongreseto.

Ĉiu esperantisto helpu al tiu ĉi kampanjo, subtenu la klopodojn fari la Infanan Kongreseton pli internacia kaj apogu laŭ tiu vojo la disvastigon de Esperanto ĉe la plej juna generacio. Ni dankas en la nomo de la helpotaj infanoj.

LA LOKA KONGRESA KOMITATO

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 9 aprilo 1961

Adoptaj Gepatroj :

Kontribuis al la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" (po 3 pundoj) : Esperanto-Societo en Leeds, Junulara Esperanto-Societo en Croydon, Nord-Orienta Federacio de B.E.A. (dufoje), F-ino N. Nanson en Halifax, Leicester-Esperanto-Societo, S-ro B. B. Beaumont en Huddersfield, Esperanto-Federacio de Lancashire kaj Cheshire, S-ro H. W. Hartley (ĉiuj el Britujo), Grupo "Verda Nordo" en Berlino, S-ino Woessink-Boet H. J. en Arnhem (Nederlando), D-ro Maillard, Esperanto-Societo en Liono (Francujo). Donacis diversajn sumojn al la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" : la tuta Estraro de Franca Esperantista Unuiĝo (S-roj Llech-Walter, Ribot, Rousseau, Thierry, Guillaume, Petit) kaj S-ro F. Taylor. Entute, la Fondaĵo ĝis la fino de marto kolektis 61 pundojn. La Kongresa Komitato intencas inviti infanojn el Finnlando, Jugoslavio, Pollando : la tuta bezonata sumo estas ĉ. 200 pundoj.

T.E.J.O.-Kongreso :

Glumarkoj de la 17-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O. en Wokingham estas nun haveblaj en folioj de 12 markoj je la prezo de 6 anglaj penoj (aŭ 1 respondkupono) por unu folio, plus 3 penoj por la poŝtkostoj. Mendoj estu direktitaj al 17-a I.J.K. de T.E.J.O., Downing College, Cambridge, Britujo.

Antaŭkongreso :

La Akceptejo de la Antaŭkongreso estos salono de la Royal Hotel, Woburn Place, Russell Square, London, W.C. 1, (enirejo tra "Café Royal"). Horoj : mardon, 1. Aŭgusto; 18,00 ĝis 20,00-a h.; aliajn tagojn : de la 9-a h. ĝis la 21,00-a h.

Sonbendo :

Mendis la kongresan sonbendon por organizi societajn vesperojn la Esperanto-Societoj en Lund, Malmö kaj Örebro (ĉiuj en Svedujo), Dimitrovgrad kaj Tarnovsko (Bulgarujo), Chateauroux (Francujo), Hago (Nederlando), Leeuwarden (Nederlando), Munkeno (Germanujo), Blackburn (Britujo).

Diservo :

La protestanta diservo kun prediko en Esperanto okazos ĉe la Preĝejo de S. Petro en Harrogate dimanĉon la 6-an de aŭgusto je la 16-a h.

Nova Teatraĵo :

Esperantista teatra trupo, gvidata de S-ro N. Lock el Bristol, prezentos en la Internacia Lingvo dum la Kongreso la unuaktan teatraĵon de Ĉeĥov "La Urso".

Jugoslavaj Ensembloj :

Interkonsente kun Slovenia Esperanto-Ligo, la Loka Kongresa Komitato invitis jenajn esperantistajn jugoslavajn ensemblojn ludi en la kadro de la Arta Festivalo :

1. Junulara kantĥoro Ljubljana (40 personoj)
2. Vokala vira okteto Ljubljana
3. Kabareda ensemblo (instrumentala trio kaj vokala terceto).

"La mondo ne havas atendejon" :

La Esperanto-teatro Ljubljana ludos en la kadro de la Arta Festivalo la dramon de Dekker "La mondo ne havas atendejon".

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 10 majo 1961

Adoptaj gepatroj :

Fariĝis "Adoptaj Gepatroj" : Esperanto Grupo en Bristol, S-ino A. Dean en Prestwich, F-ino M. Gill en Bradford, Ges-roj Sly en Letchworth (ĉiuj el Britujo), F-ino K. Burger en Zeist (Nederlando), F-ino K. Walden, Borlänge Esperanto-Asocio, Esperanto-klubo en Falun, Esperanto-klubo en Sundsvall, Esperanto-klubo en Ystad, S-ino K. Olsson en Ystad (ĉiuj el Svedujo). Donacis diversajn sumojn al la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" : Ges-roj Curran en Pickering, F-ino W. Hirst en Huddersfield, F-ino W. Carter en Bradford (ĉiuj el Britujo), S-ino N. B. Nilsen el Norvegujo. Ĝis la fino de aprilo la Fondaĵo kolektis 107 pundojn. La Kongresa Komitato jam invitis 1 polan infanon, 1 jugoslavan kaj 1 svedan.

Sonbendo :

Mendis la kongresan sonbendon Esperanto-Societoj en jenaj urboj : Oslo (Norvegujo), S.-Altenwald (Germanujo), Montpellier (Francujo), Southampton (Britujo), Bilbao (Hispanujo), Nilopolis (Brazilo).

Blindula kongreso :

Dum la 31-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj estos diskutata raporto pri "Laboro kaj celoj de la Ligo de Helpantoj de la Surd-mutuloj" kaj estos aranĝata Tiftologia Ekspozicio.

Katolika diservo :

La katolika diservo okazos en la Preĝejo St. Robert : celebros Sac. L. Thalmaier, kiu predikos pri "Kristana karito kaj Esperanto".

Nova filmo :

La granda fabrikejo Bristol Siddeley Engines decidis eldoni filmon kun Esperanto-parolo. La filmo estos prezentita en la kadro de la film-prezentadoj dum la Arta Festivalo.

Kongresa bufedo :

Interkonsente kun la aŭtoritatoj de la Urbo Harrogate la Kongresa Komitato decidis malfermi bufedon en la Kongresejo. La Bufedo liveros, krom refreŝaĵojn, diversajn malvarmajn manĝojn. Ĉar estas supozeble, ke dum la kongresa semajno la restoracioj en Harrogate estos tre plenaj, L.K.K. sugestas al ĉiu kongresano interkonsenti kun sia Hotelo pri la taga(j) varma(j) manĝo(j), prefere per aranĝo de duona aŭ plena pensio.

Libro-ekspozicio :

La Kongresa Komitato decidis organizi en Harrogate, dum la kongresa semajno, ekspozicion de Esperanto-literaturo, por neesperantista publiko.

Geografia semajno :

La Kongresa Komitato donis sian oficialan aŭspicion al la Internacia Geografia Semajno, kiu okazos en la Universitato de Leicester de la 12-a ĝis 19-a de aŭgusto 1961.

Nova teatraĵo :

Amatora trupo el Londono, konsistanta el S-ino E. Rapley, S-ro J. C. Wells kaj S-ro V. Sadler, ludos en la kadro de la Arta Festivalo la unuaktan japanan dramon "Okuni kaj Gojei" de Zyun'itiro Tanizaki.

Statistiko :

(ĝis la fino de aprilo) : Alĝerio 2, Argentino 4, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 12, Belgujo 28, Brazilo 6, Britujo 505, Bulgarujo 7, Danlando 52, Finnlando 26, Francujo 183, Germanujo 97, Hispanujo 8, Hungarujo 6, Irlando 4, Israelo 4, Italujo 67, Japanujo 4, Jugoslavujo 84, Kanado 8, Madagaskaro 2, Maroko 5, Nederlando 83, Norvegujo 10, Novzelando 2, Persujo 1, Pollando 25, Portugalujo 11, Svedujo 92, Svisujo 23, Sudafriko 5, Sovetunio 1, Turkujo 1, Usono 7. Entute 1380 kongresanoj el 34 landoj. (Pasintjare 1465).

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

ESPERANTISTA VIVO

JUBILEOJ

Rajski. Eminentia esperantisto s-ro Andreo Rajski, prezidinto de la Pola Esperanto Asocio kaj de la Loka Kon-

gresita Komitato preparinta la 44an Universalan Kongreson, nuna estrano de UEA, festas en la nuna jaro la 50an datrevenon de sia naskiĝo kaj la 35an de esperantistiĝo. Korajn gratulojn al la meritplena jubileanto kaj bondezirojn por plua fruktodona poresperanta agado.

Starke. S-ro Alexander Starke, esperantisto ekde 1922, UEA-ano de 1924, dum multaj jaroj UEA-delegito en Nürnberg kaj Erlangen, kaj nun fakdelegito por teatro en Nürnberg, festis la 12an de majo sian 70-jaran datrevenon. Li estas tre multe konata en kaj ekster Esperantujo kiel aktoro kaj amuzanto, kaj kun la edzino ludis multajn ĉefrolojn en kongresaj teatraĵoj. Liaj sennombraj amikoj lin kore gratulas.

Wollmann. Kortega konsil. d-ro Fr. Wollmann, emer. viena landa lernejspektoro kaj iniciatinto de la ŝtataj Esp.-ekzamenoj, festis fine de marto en plena freŝeco sian 90-an naskiĝtagon.

NEKROLOGO

Bowden. F-ino M. E. Bowden, (Clarach, Prestatyn, Kimrujo, Britujo,) Sekretariino-kasistino de Budhana Ligo Esperantista, mortis lastatempe. La japanaj membroj de BLE daŭrigas la gvidadon de la Ligo, kaj oni estas petata sendi ĉion al la reprezentanto en sia mondparto.

Brussi. La 25an de marto 1961 mortis en Trieste s-ro Matteo Brussi, esperantisto ekde 1924 kaj FD pri doganaj aferoj, en aĝo de 76 jaroj.

Eltchkner. Mortis en Praha la 22an de januaro 1961 lia episkopa moŝto ThDr. Antonín Eltchkner.

Eriksson. La 25an de marto mortis en Stokholmo Bernhard Eriksson, libropresisto. Li naskiĝis en Falun 1890. En Ludvika 1922 kaj post 1927 kiel posedanto de Sturetryckeriet en Stokholmo li presis multajn esperantolibrojn. Li redaktis la organon de Sveda Esperanto-Federacio 1928-'38 kaj estis estro de Eldona Societo Esperanto dum deko da jaroj depost 1941. Li ankaŭ estis prezidanto de la Grupo Esperantista en Stokholmo.

Jenckel. La 26an de marto mortis en Hamburgo, Germanujo, Elza Jenckel. Ŝi naskiĝis en 1881 kaj esperantistiĝis en 1907. Ŝi estis Honora Membro de la klubo en Hamburgo, kaj UEA-membro de 1950.

May. En la aĝo de preskaŭ 82 jaroj mortis la 7an de marto 1961 veterano kaj multjara subtenanto de UEA Johannes May, St. Wendel, Sarlando. Nelonge post la 1-a UK li lernis nian lingvon kaj restis fidela al ĝi ĝis sia morto. Lia aktiveco : instruado kaj verkado de varbartikoloj.

Neary. La 7an de marto 1961 mortis en Dublino, Irlando, s-ro J. P. Neary, konata blindulo, kiu ĉeestis pli ol dek U. Kongresojn.

Olswanger. La 7an de februaro 1961 mortis en Jerusalemo (Israelo) en la aĝo de 73 jaroj prof. d-ro Immanuel Olswanger, verkisto, tradukisto kaj konata cionista aktivulo. Li tradukis en la hebrean lingvon verkojn de Dante, Goethe, Rabindranath Tagore, kaj verkojn el angla, esperanta kaj sanskrita lingvoj. Li estis fama filologo kaj ankaŭ membro de la Lingva Akademio.

Whitehead. La 27an de februaro 1961 mortis s-ro A. T. Whitehead, UEA-delegito en Edinburgo, Skotlando, ano de la Veterana Klubo, kaj esperantisto dum 58 jaroj.

Redakcia noto

Kiel konate, nia redakcio ricevas librojn por recenzo. Kredante, ke estas nia devo liveri al eventualaj legontoj de la libroj fidindajn informojn pri la enhavo kaj valoro de la eldonaĵoj, ni klopodas laborigi kompetentajn recenzistojn. Sed ni opinias, ke eble — tre kredeble — en la vicoj de niaj abonantoj troviĝas, nekonataj al ni, homoj, kiuj volonte kaj kompetente kapablus partopreni tiun gravan laboron, se ni nur sciis pri ili. Tial ni invitas niajn legantojn, kiuj havas ambicion recenzi librojn por la revuo "Esperanto", sendi al ni specimenan recenzon de *iu ajn esperanta libro*, por ke ni povu prijuĝi ilian talenton. Ne hezitu! Ni ne promesas utiligi ĉiun provinton, sed efektive ni urĝe bezonas helpantojn por tiu ĉi grava recenza laboro. Antaŭdankon al ĉiuj kuraĝuloj, kiuj konsentos provi.

La redaktoro

KOREKTO

Ni atentigas, ke sur paĝo 94 de la maja numero de "Esperanto" 1961, pro mal-feliĉa koincido en la presejo okazis interŝanĝo de la du fotoj. Multaj legantoj certe jam komprenis, ke la dekstra bildo rilatas al Mantova, dum la maldekstra rilatas al Bejrut. Ni tre petas pardonon pro la eraro.

Dir. C.O.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

N-ro 338

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aprilo kaj ankaŭ por komparo je la fino de aprilo 1960.

	1960	1961
Asociaj membroj	5750	4937
Individuaj membroj		
MJ	655	665
MA	4400	4340
MS	501	436
Pat.	5	1
DM	351	407
HM	40	43
JMJ	22	23
JMA	163	127
	6137	6042
	11.887	10.979

NOVA PERANTO

Madagaskaro

Rousseau, S-ro Henri, A S E C N A, B.P. 730, Tananarive. (Anstataŭas S-ron Ramanitra, kiu transloĝiĝis).

DELEGITOJ

Belgujo

Bersillies-L'Abbaye (Hainaut) D : S-ro G. Schmitz, komerca konsilisto, 27, rue Reine Astrid.
FD (turismo) : La D.

Brazilo

Campos (Estado do Rio) D : S-ro J. M. Soares, bankoficisto kaj instruisto (lingvo angla), Ag. do Banco do Brasil S.A., Pr. S. Salvador, 21.

Curitiba (Paraná) JD : S-ro A. M. Petroski, maŝinskribisto, Rua 24 de Maio, 1.183.

Rio de Janeiro (Guanabara) FD (blindula klerigado) : S-ro L. C. Nunes D'Angelo, ĵurnalisto, Ferreira de Andrade, no. 504.

Britujo

Bridlington (Yorkshire E. R.) D : S-ro Norman Booth, hotelestro, "St. Healers", 68 Windsor Crescent.

Henley-on-Thames (Oxfordshire) FD (kvakerismo) : S-ro D. G. Lee, loka registara oficisto, 45 Northfield End.

Oxford (Oxfordshire) FD (biblioteko) : S-ro K. W. Wilson, bibliotekisto, 30 Laburnum Crescent, Kidlington.

Bulgarujo

Dimitrovgrad (Okrag Haskovski) D : S-ro V. Ĥristozov Valĉanov, komercoficisto, Ulica General Gurko 15.

Madagaskaro

Ambanja (Diégo-Suarez) D : S-ro H. Ramanitra, administracia asistanto, district d'Ambanja.

Tananarive JD : S-ro G. Razafindramiantra, studento, 37, Avenue Ranarivelo Behoririka.

Nederlando

Hilversum (Noord-Holland) FD (ŝakludo) : S-ro J. H. Morreau, revizoro, Tesselschadelaan 10.

Zaandam (Noord-Holland) JD : S-ro W. F. Pilger, studento, Vermeerstraat 7.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

328. Mohacsy, D-ro J., New York, Usono; 329. Nace, S-ro P.E., Hyattsville, Usono; 330. Vidack, S-ro J., Seattle, Usono.

331. Harry, S-ro R., Forrest Canberra, Aŭstralio; 332. Kosutek, S-ro J., Sydney, Aŭstralio; 333. Prewett, S-ro J. N. Rochester, Aŭstralio; 334. Pich, S-ro J., Galtenleutgeben, Aŭstrujo; 335. Boffejon, S-ro H., Brasschaet, Belgujo; 336. Geers, F-ino B., Antwerpen, Belgujo; 337. Kestens, F-ino M., Bruselo, Belgujo; 338. Mathieux, S-ro F., Bruselo, Belgujo; 339. Staes, S-ino E., Bruselo, Belgujo; 340. Vandavelde, S-ino M., Merelbeke-Gent, Belgujo; 341. Aitchison, S-ro G. R., Northampton, Britujo; 342. Appleby, S-ino C. I., Nottingham, Britujo; 343. Atkinson, S-ro G. B., London, Britujo; 344. Challenger, S-ro J. K., Leeds, Britujo; 345. Gardner, S-ro C. W.,

Sheffield, Britujo; 346. Ison, F-ino H. M., Colchester, Britujo; 347. Knight, S-ino E. B., London, Britujo; 348. Laurie, S-ro E. J., Bournemouth, Britujo; 349. Lauri, S-ino W., Bournemouth, Britujo; 350. Moberly, S-ro E. W., London, Britujo; 351. Pearson, F-ino E. M., York, Britujo; 352. Relf, S-ro E. F. Addlestone, Britujo; 353. Sharp, S-ro G., Bournemouth, Britujo; 354. Smith, F-ino D. E., Stalybridge, Britujo; 355. Sŝuire, F-ino E., West Hartlepool, Britujo; 356. Lassen, S-ro Aug., København, Danlando; 357. Møller, S-ino E., Vester Nebel, Danlando; 358. Schrøder, S-ro O. København, Danlando; 359. Bastien, Gen. L., Paris, Francujo; 360. Dalier, S-ro H., Mauleon-Soule, Francujo; 361. Philippe, S-ro H., Arras, Francujo; 362. Ploussu, S-ro A., Grenoble, Francujo; 363. Bechtold, S-ro L., Giessen, Germanujo; 364. Gerwin, S-ro R., Lobberich; 365. Michling, S-ro Ing. H. Göttingen, Germanujo; 366. Báez Báez, S-ro J., Las Palmas, Kanariaj Insuloj; 367. Perarnau, S-ro J., Tarrasa, Hispanujo; 368. Campetti, Prof. D-ro G., Lucca, Italujo; 369. Pacelli, Prof. G., Pisa, Italujo; 370. Viti, S-ro G., Roma, Italujo; 371. Armanis, S-ro A., Lier, Norvegujo; 372. Oliveira, S-ro B. A. dos Santos le, Lissabon, Portugalujo; 373. Almen, S-ro P., Hällefors, Svedujo; 374. Bengtsson, S-ro K., Krylbo, Svelujo; 375. Edler, S-ro P., Göteborg, Svedujo; 376. Eriksson, S-ro A., Ramvik, Svedujo; 377. Gustafson, S-ro K. E., Bergvik, Svedujo; 378. Hallgren, F-ino A. L., Stockholm, Svedujo; 379. Larsson, S-ro C., Västerås, Svedujo; 380. Lindberg, S-ro T., Prässebo, Svedujo; 381. Möllestad, S-ro S., Kramfors, Svedujo; 382. Nilsson, S-ro T., Vattjom, Svedujo; 383. Olsson, S-ro O., Lund, Svedujo; 384. Pålsson, S-ro H., Hässleholm, Svedujo; 385. Seden Dahl, S-ro C. B., Akersberga, Svedujo; 386. Snarberg, S-ro J., Stockholm, Svedujo; 387. Svensson, F-ino G., Malmö, Svedujo; 388. Tell, S-ro L., Norrköping, Svedujo; 389. De Sassi, S-ro M., Zürich, Svislando; 390. Culbert, S-ino R. L. Moline-, Tacoma, Usono; 391. Culbert, D-ro S. S., Seattle, Usono; 392. Milsted, S-ro H. B., Zanesville, Usono.

393. Isaacs, S-ro S. A., Willemstad,

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

Radio Roma. 2-VI, Sanremo, la urbo de la 32-a Itala kongreso; 6-VI, Tra la literaturo; 9-VI, Leterkesto kaj bibliografio; 13-VI, Granda itala sanktejo S-ta Antono en Padova; 16-VI, Novaĵoj el Italujo; 20-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-VI, La fontanoj en Romo; 27-VI, Itala komponisto Ottorino Respighi; 30-VI, La itala verkisto Collodi. Krome ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj : S-ro Luigi Minnaja kaj D-ro Vincenzo Musella.

Pola Radio elsendos ĝis Septembro per ondoj 249 m. (1205 kcs.), 42.11 m., 31.50 m., 31.45 m., 31.01 m., 25.42 m., 25.28 m., 25.06 m. Sama horo ĉiutage.

Svisa Radio ŝanĝis horon kaj tagojn de siaj elsendoj. Vidu la majan numeron.

Curaçao, Antiloj Nederlandaj; 394. Pérez, S-ro V., San Francisco, Argentino; 395. Halbedl, D-ro A., Knittelfeld, Aŭstrujo; 396. Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo; 397. Inst-ino Viv. de M. Caymmi, Salvador, Bahia; 398. Yolanda de Araujo Costa, Rio de Janeiro, 399. Falcão, S-ro F., Belem-Pará, 400. Farias, S-ro B. G., Feira de Santana, 401. Gama, S-ro João de Oliveira. Juiz de Fora, 402. Knoedt, S-ro L. H., Salvador, 403. Mélo, S-ro Roskildes Pereira de, Guajará Mirim, Rondonia, 404. Pessoa, D-ro F. Negreiro de Vasconcelos, Salvador-Bahia, 405. Varanda, S-ro José, Petropolis-RJ, Brazilo; 406. Crabtree, S-ro E. P., Kirkheaton, 407. Hilder, S-ro E. C., Bideford, 408. Livett, S-ro L. G., Riddlesden, 409. Mills, F-ino C., Denton, 410. Pilling, F-ino F., Poulton-le-Fylde, 441. Pilling, S-ino F. K., Poulton-le-Fylde, Britujo; 412. Beaucaire, S-ro L., Berlin, 413. David, D-ro Ed., Nürnberg, 414. Schumacher F-ino M., Hildesheim, 415. Wingen, S-ro W., Köln-Sülz, Germanujo; 416. "Nordo" de "Educacion y Descanso", Oviedo, 417. Alavedra, S-ro V., Tarrasa, Hispanujo; 418. Sgroi, S-ro rag. R., Catania, Italia;

lujo; 419. Randrianasolo, S-ro G., Tananarive, Madagaskaro; 420. Frutoso, S-ro P., Mèknes, 421. Gomez, F-ino A., Mèknes, Maroko; 422. Considine, S-ro P., Ibadan, Nigerio; 423. Dickson, S-ino M. E., Cape Town, Sudafriko; 424. Ek, S-ro A., Hässleholm, 425. Jennis, S-ino M., Jönköping, 426. Söderlund, S-ro B., Kumla, Svedujo.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato : 107 MA, 23 MJ, 2 J-MJ kaj 1 J-MA.

S-ino B. Torbell, Danlando, 1 MA; S-ro J. Vilkki, Finnlando, 1 MA; Senomulino, Finnlando, 1 MA; S-ro N.R. Smith, Britujo, 6 MA kaj 1 MJ; S-ro D. B. Gregor, Britujo, 1 MA; S-ro A. Wetterstein, Germanujo, 1 MA; "Tampereanoj", Finnlando, 1 MA; S-ro A. Lucas, Hispanujo, 1 MJ; S-ro Marly, Francujo, 1 MA; S-ro A. Alves de Almeida, Brazilo, 2 MA; D-ro C. A. Wutke, Brazilo, 1 MJ; F-ino I. Gaston, Hispanujo, 1 MA; S-ro E. Carlén, Svedujo, 4 MA; D-ro C. A. Wutke, Brazilo, 1 MA; S-ro E. Sonnenfeld, Argentino, 1 MA;

Entute : 129 MA, 26 MJ, 2 J-MJ kaj 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo 18.593,96 gld.

S-ro L. Funken, Germanujo, 1,81 gld.; F-ino F. P. Termaat, Nederlando, 5,— gld.

Entute 18.600,77 gld. je 1.5.1961.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio por firmigi la akiritajn poziciojn !

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro E. Sonnenfeld, Argentino, 95,— gld.; S-ro E. Bossong, Nederlando 5,— gld.; S-ro F. Garcia Blazquez, Venezuelo, 18,— gld.

DONACOJ AL GENERALA KASO

Romkatolika Pastro, Britujo, 21,13 gld.; S-ro W. Jacob, Germanujo, 1,81 gld.; S-ro E. Richter, Germanujo, 1,81 gld.; S-ro I. Calabresi, Italujo, 4,50 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

AVERTO: Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Koresponda Servo de U.E.A. (K.S.M.) 12, rue des Jacobins. Ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi, sed ne povas postuli rektan respondon de la korespondservo. Lia adreso estas transdonita ĉiufaje laŭ taŭgaj proponoj de uzantoj de la servo, kiuj aldonas respondkuponojn. Ĉiamaniere K.S.M. povas peri adresojn nur laŭ la disponebla materialo. Bedaŭrinde el la transmaraj landoj alvenis ĝis fino de Aprilo nur malmultaj proponoj kaj tial diversaj korespondpetoj el eŭropaj landoj restis nekontentigitaj. — K.S.M. sincere esperas, ke la partopreno el aliaj kontinentoj baldaŭ multobliĝos kaj ke la malfruigo estas kaŭzita nur pro la tro longa ŝipvojaĝo de "Esperanto", ne pro manko de intereso pri alikontinentanoj. Amikeca samideaneco atendas vin ĉiulande. — Petante adresojn bonvolu skribi viajn nomojn kaj kompletan adreson preslitere kaj aldoni kelkajn informojn pri vi mem: vian aĝon, profesion, ĉefajn interesojn, ktp. Interesuloj, kiuj deziras ricevi rektan respondon de la korespondservo, bonvolos aldoni unu respondkupanon (aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn) po ĉiu petata adreso. Tiuj, kiuj senpage enskribiĝas, devas pacienci, ĝis kiam iu alia sendas al li korespondproponon. — K.S.M. ŝparas nenian penon por kiel eble plej rapide kontentigi ĉiujn dezirojn kaj starigi indan tutmondan korespond-

servon, tamen ĉio estus vana, se ne alvenus proponoj el la tuta mondo.

Antaŭ Harrogate - Londono! Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento". Prospekton petu de S-ro V. Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, London, N. 5. Ne prokrastu!

La nova kristaneco, bazita je la doktrino de sciencisto kaj reformanto, E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha II, Ĉeĥoslovakio.

Amazonas, ekskursoj: januaron 1962 surgrimpo "Llullayllaco" 6800 m, vizito al pinta indiĝena tombejo neniam antaŭvizitata — 15 tagoj; aŭguston — septembron 1962 amazona ĝangalo.

Informoj — partoprenoj: José Cerato, Dorrego 1549, Junior's, Córdoba, Argentino.

"Per koncentriĝo en grupoj de mil, la esperantistaro helpas al la movado kaj homaro", asertas D. Soleo. Sed Dovro ankoraŭ ne estas koncentrejo nek trudas sian doktrinon D. Soleo! Sentime haltu en Dovro.

3 Danaj Junulinoj (16-17-17 jaraj), komencantinoj, deziras korespondi kun gejunuloj el Nederlando, Hispanujo kaj Italujo. Skribu al instruisto A. Skovrind, Egebjerg, Braade, Danlando.

Franca Fervojista Asocio de Sangodonantoj deziras interrilati kun fervojistoj-sangodonantoj el eŭropaj landoj: 1. Organizado de sanga transfuzo, 2. Eventuala ekzistado de fervojista

asocio de sangodonantoj en eŭropaj landoj. Leclercq, Lucien, Delegito de U.E.A. — S.N.C.F. V.B. (vtz), 18 Rue de Dunkerque, Paris 10.

Marjo van Bentum, membro UEA, IKUE, MEM kaj AM de UL, Sportlaan 1234, Hago (Nederlando) petas pardonon, ke malsano prokrastas la korespondadon kaj la aktivan poresperantistan kaj porpacan laboron.

Malnova Latva esperantisto Jánis Kulitáns deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj. Adreso: USSR-Latvijas PSR, Siguldas rajoná, pasts Al-laži, Gravás.

S-ro Romualdas Šulskis, Konservatorio, Vilnius, Litova SSR, USSR, studento-muzikisto, korespondos pri muziko, interŝanĝos per diversaj livreblaj aĵoj. Respondo garantiata.

S-ro E. W. Woodruff, ĉefdelegito por Sudafriko vojaĝos eksterlanden de 1 julio ĝis 28 septembro. Bonvole dum ĉi tiu tempo adresu ĉiujn petojn kaj korespondaĵojn rilate al U.E.A. al la vicdelegito S-ro T. C. Hawley, P.O. Box 1167, Johannesburg, Sudafriko.

F-ino Sinikka Mättö, Susitie 28 F 42, Helsinki, Finnlando, deziras interŝanĝi bildkartojn el la tuta mondo.

Kie en la mondo ekzistas urbo aŭ vilaĝo kiu havas la nomon Bingen? Ni petas tion komuniki al: Esperantogrupo, Bingen/Rhein, Germanio. Jam antaŭe ni dankas al ĉiuj informoj tiurilate kaj ni rekompencos la elspezojn. Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la ĉarma urbo Bingen apud Rejno, postulu broŝurojn ilustritajn kaj informojn kun esperantlingva teksto rekte ĉe: Urba Fremdultrafika Oficejo, Bingen/Rejno, Germanio. Ĉiu petanto ricevos la gvidilojn senpage.

La multe atendata faka revuo esperantista

La kolektanto Internacia

ekkomencos aperadi la 1-an de julio 1961 en bela multkolora, riĉe ilustrita formo je utilo kaj bezono de filatelistoj kaj aliaj diversspecaj kolektantoj.

Jarabono : 2,5 us. dol. aŭ egalvaloro en alia valuto.

Pagoj en pm. akceptataj nur en kompletaj neuzitaj memorigaj (motivaj) serioj.

Anoncetoj : pri korespondado kaj interŝanĝo 0,75 us. dol. aŭ egalvaloro por minimumo ĝis 25 vortoj aŭ mallongigoj. Por ĉiu plia vorto aŭ mallongigo ankoraŭ 3 cendoj.

Reklamoj-ofertoj je paĝo 32 us. dol.

Senpaga prospekto liverbla !

Adreso : La kolektanto internacia

LJUBLJANA, poŝtkesto 239 "Esperanto"
Jugoslavio.

Jus aperis la furorlibro de la junaj astronomoj-esperantistoj

TRAGEDIO EN LA UNIVERSO

96 paĝoj, kolorkovriloj. Prezo : 0,75 dolaroj, 10 steloj (aŭ egalvaloro). Aŭfranko enkalkulita.

La junaj astronomoj-verkintoj invitas vin samtempe al

"ESPERANTUJO"

— la internacia esperantista somerumejo en la romantika golfo apud Primošten ĉe la Adriatika maro.

Sinbanado en la lazuro de la suda maro. Senpaga velboatado tra la bluaj fjordo kaj golfoj. Fiŝkaptado, ĉemara sporto, amuzo, vesperdanco, perŝipaj ekskursoj ktp.

Idilieca esperantista tendaro en ĉarma pinarbareto kun la vigla tendara vivo apud la marbordo. Propra ESPERANTISTA OBSERVATORIO ĉe Mediteraneo !

La prezoj ekstre favoraj : tuttaga pensio (dormo kaj manĝo) por la entendaj libertempantoj kostas 1,33 dolarojn (aŭ egalvaloro). Tuttaga pensio por la endomaj libertempantoj 1,67 dolaroj.

Al la esperantista somerumejo anoncis sin jam multnombraj gesamideanoj el multaj landoj — Aŭstrujo, Germanujo, Francujo, Svisujo, Italujo, Belgujo, Nederlando, Anglujo, Svedujo, Finnlando k.c. Oni alvenas eĉ grupope kaj familiope kun amikoj favoraj al Esperanto.

Por ĝui la romantikan idilion en pitoreskaj marpejzaĝoj meze de la internacia familia rondo — aliĝu tuj !

Por ĉiuj alvenanoncoj, mendoj kaj informoj turnu vin rekte al la KROATIA ESPERANTO-LIGO, Zagreb, Amruŝeva 5/I, poŝtfako 213 aŭ al la ASTRONOMIA OBSERVATORIO, Zagreb, Opatička 22, poŝtfako 165, Jugoslavio. Nepre postulu la senpagan informprospekton (en Esperanto !)

Konsiderinde reduktitaj prezoj por la Libroj

Biografio Tito	1.80 US dol.
Esperanto kaj lernejo	1.25 „ „
Tri Satiroj	0.25 „ „
Kvar Prelegoj pri E. Literaturo (D. Kralj)	0.90 „ „
Panjo (trad. J. Korinek) J. Seifert	1.00 „ „
Kavo (trad. Vanĉik) G. Kovačič	1.00 „ „

Porinfana literaturo (kolore ilustr. rakontoj)

Stelita Lampo, bind.	0.60 „ „
Mojca Etulino, broŝ.	0.25 „ „
Varma Rivereto, bind.	0.50 „ „
Varma Rivereto, broŝ.	0.25 „ „

ktp. ktp.

Kompleta prospekto senpage
Libroj mendeblaj ankaŭ ĉe UEA
Rotterdam

Slovenia Esperanto - Ligo
Eldona Sekcio, Ljubljana poŝtfako 239

La Suda Stelo - Prometeo

Internacia Revuo pri sociaj, kulturaj literaturaj
Jarkolektoj riceveblaj :

Bibliografio, Verda Paletro, Portretoj ktp.
Jarkolektoj riceveblaj :

1959 kaj 1960 po 1 US dol. aŭ egalvaloro
duontole binditaj kun


ora surpriso 1.5 US dol. aŭ egalvaloro

Jarabono por 1961 1.5 US dol. aŭ egalvaloro

Aperos kvaronjare (4 n-roj). Prospekto senpage
liverbla. Perantoj en ĉiuj landoj.

LA SUDA STELO - PROMETEO

Ljubljana, poŝtfako 239



Prezo :
5.— gld.,
20 steloj

"Mi tre ĝojas, ke vi sukcesis pliriĉigi nian neabundan fakan literaturon per ankoraŭ unu valora popularscienca libro, kaj mi kore vin gratulas pro ĝia bonkvalita enhavo. Ĝi estas tute distra legaĵo, ĝuste el la speco, kiun ni tiel ege bezonas."
(D-ro Paul Neergaard (Kopenhago) en letero sendita al la reverkinto la 4.1.1961.)

Eldoninto en okcidento : U.E.A.

Moderna lernolibro de Esperanto

por la tuta mondo

Vilho Setälä :

Privilegia Vojo

al lingvoscio : Esperanto

Kun instrukcioj en multaj naciaj lingvoj

Prezo 10 steloj + sendkosto

Kuneldoninto por la landoj ekster Finnlando kaj Svedujo : U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

FERMENTARIO

GRAVA VERKO DE UNIVERSALA VALORO
unu el la ĉefaj de la urugvaja pensulo
D-ro CARLOS VAZ FERREIRA

El la hispana tradukis Prof. M. Fernández Menéndez.
Reviziis Akad. D-ro Porto Carreiro Neto kaj Prof. Ismael Gomes Braga.

Aldone biografio kaj portreto de la aŭtoro kaj antaŭparolo kaj glosareto de la tradukinto.
Volumo : formato 21 × 15; 264 paĝoj; bona papero; bone bindita per kartoneto kun bela kovrildesegno.

Prezo US \$ 2.00 (du dolaroj) afrankite

La libron liveras UEA, la diversaj libroservoj kaj la eldoninto URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO, pere de sia Komisiito Prof. M. Fernández Menéndez, Calle 21 de Setiembre, 2405-Montevideo (Urugvajo)

"UNIVERSALAJ PRINCIPOJ"

Esperanta resumo pri racia nova filozofio :
\$ -,10 aŭ -,40 Gld.
1,60 Steloj
Mendu ĉe U.E.A. !

BINDITA JARKOLEKTO 1960

en plaĉa verda tolo
Prezo : 9.— gld.; 36 steloj.
Por MA de tiu jaro duona prezo.
Kvanto limigita ! Mendu tuj ĉe U.E.A.

La sankta biblio

antaŭe elĉerpita
REAPERIS !

Prezo : 6,50 gld., 26 steloj. Luksa eldono en ledon :
17,60 gld., 70,40 steloj.
Kun instrukcioj en multaj naciaj lingvoj

FERIAJ KULTUR-SEMAJNOJ

Esperanto kaj Geonismo

Kastelo MÜNCHENWILER

apud MURTEN - MORAT, Svislando

6-20 aŭgusto 1961

Dir. : D-ro W. Perrenoud, Prof.
Prospekto kaj informoj : Svisa Esperanto-Instituto
Breitenrainstrasse 12, BERN.

MEMORLIBRO

pri la Zamenhof-Jaro

Ĉu vi jam havas ĝin ? Donacu ĝin en ĉiuj okazoj
en kiuj vi deziras ion donaci al esperantisto !

Prezo : 12,50 gld.; 50 steloj.

ALIĜU AL LA

46-a Universala Kongreso de Esperanto

(Harrogate : de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1961)

Lasta limdato : la 30-an de junio 1961

UNUA INTERNACIA ARTA FESTIVALO

Aliĝu al la Cseh-Seminario !

Partoprenu en la Oratora Konkurso !

Ekzameniĝu okaze de la Internaciaj Ekzamenoj !

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam.